

3^o JARO.

OCEANO

N^o 11

TRA LA MONDO.

·TUTMONDA·ILUSTRATA·REVUO·ESPERANTISTA·

MAJO

1908.



ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

ĈIULANDAJ KUTIMOJ: Iom pri la veturado kaj la transportiloj en Madejro, de *E. Ĉeŝeĉ*, (GERMANUJO).

DIVERSAĴOJ: Kelkaj miroj en Nov-Jorko, de *William E. Baff* (USONO).

ARTISTA KAJ LITERATURA VIVADO: La kantsocieto de Moravaj instruistoj.

TEATRO: Pri Ifigenio en Taŭrido, de *A. Montrosier*. — Teatra prezentado en Parizo, de *Steleto*.

ĈIULANDA LITERATURO: La Aglino, fablo de *Frederika Bremer*, tradukita de *Frederik Skog*, (SVEDUJO). — A - a - ĉu! Aŭ la terna fianĉiĝo, de *W. M. Page* (SKOTLANDO). — Ĝi ne estis pomo, de *J. Fize* (FRANCUJO).

DIVERSAJ SCIENCŬOJ: Filozofio. La organizo de la germanaj logioj de *Ch. Barthel* (GERMANUJO).

RELIGIA HISTORIO: Portreto de Kristo laŭ nova trovaĵo, de *Pastro Ruspoli* (ITALUJO). — Religia historio laŭ Renan, de *P-ro Buquet* (FRANCUJO).

VIRINA PAĜO: Modo, de *Roksano* (FRANCUJO).

PRI ESPERANTO: Kroniko, Bibliografio de *A. Montrosier* kaj *Steleto*.



Abono. Jara: 8 fr. (3,20 Sm.) ĉiulande — Duona: 4,50 fr (1,80 Sm.).

La abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Adreso: « Tra la mondo » Meudon (S. & O.) Francee.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Oni skribu legeble, sur respond-poŝtkarto; aŭ oni aidonu respondkuponon al la leteroj.

Internaciaj RESPOND-KUPONOJ estas akceptataj kiel 25 cent (10 o).

Oni rememorigu *ĉiam* pri sia adreso.

CAROLINE
OXENFORD, E.V.
1907.

« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE monatfine krom en Aŭgusto.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Ĉiuj korespondataĵoj, manuskriptoj, k. a. devas esti senditaj nur al nia administracio por eviti erarojn aŭ prokrastojn.

Urĝaj sciigoj: REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ la 10^a de ĉiu monato por la tuj elirona Numero.

ONI ABONAS ĉe nia administracio (Vidu la 1^{an} paĝon) aŭ ĉe la esperantistaj gazetoj kaj abonejoj. Oni aldonu ĉiam la abonpaĝon.

ATENTU, Sinjorino

vi ekdikigas, kaj dikiĝi estas maljuniĝi. Prenu do ĉiutage du drageojn da **THYROIDINE BOUTY**, kaj via talio restos aŭ reiĝos svelta.

La flakono da 50 drageoj estas sendata afranke de la: **Laboratoire, 1, Rue de Châteaudun, Paris**, kontraŭ poŝtmandato de **10 fr.** Kuracado sendanĝera kaj nepre efika.

Oni zorgu precizi: **THYROIDINE BOUTY.**

Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

PARIS-ORAN.

La luksa vagonaro « Paris-Barcelone-Valence » iras ĝis Kartageno, kun daŭro per ŝipo (marveturado 9 hor.) inter Kartageno kaj Oran; li korespondas ĉe Oran kun ekspresoj de kaj al Alĝero.

Deiro de Parizo P. L. M. merkrede kaj sabate je 7 h. 20 vesp. Alveno en Kartageno, vendrede kaj lunde je 8 h. 45 mat.; en Oran, vend. kaj lunde je 6 h. 45 vesp.

Festo de la Ĉieliro 1908.

Okaze de la Festo de la Ĉieliro, la reirkuponoj de l' ir- kaj reirbiletoj, liveritaj de la 26^a Majo estos valoraj ĝis la 2^a de Junio entenate.

La sama favoro estas ĝuebla de l' opaj ir- kaj reiraj biletoj liveritaj al familioj je almenaŭ 4 personoj.

Festo de la Pentekosto 1908.

Okaze de la Festo de la Pentekosto, la reirkuponoj de l' ir- kaj reirbiletoj, liveritaj de la 4^a de Junio, estos valoraj ĝis la 11^a de Junio entenate.

La sama favoro estas ĝuebla de l' opaj ir- kaj reiraj biletoj liveritaj al familioj je almenaŭ 4 personoj.

VIVO DE JESUO

de ERNEST RENAN

laŭ la 78^a milo franca tradukis

EMILIO GASSE

Mendebila ĉe ĉiuj librovendistoj, ĉe Emilio Gasse, 77, r. Ernest Renan, Havro, Francujo, kaj ĉe ĉiuj korespondantoj:

British Esperantist, Germana Esperantisto, Ruslanda Esperantisto, Esperantisten, kaj Sr^o Karl Jost, Fröhlichstr., 40, Zürich (Svisujo).

POR ESPERANTO ★ POR ESPERANTISTOJ

Vera Vino Campanja

Originala Produktejo de
FORTIN PÈRE & FILS en EPERNAY (France).

PETU
LA
ORA MARKO.

SENPAGAN TARIFON

Novaj organoj: Nia agema samideano Sr^o A. de Marich, direktoro de « La Verda Standardo » kaj de la « Universala Biblioteko », ĵus fondis novan ĵurnalon « Esperanta Internacia Revuo », organon de la « Hungara Konsulejo », kiu celas doni komercajn sciigojn, « makleri ĉiuspecajn komercajn aferojn, doni informojn; akcepti mendojn kaj komisionojn, enpresi komercajn anoncojn, k. t. p. » Jare 2,08 Sm. Adm. kaj Red.: Budapeŝt, Ŭllői-ŭt 59.

* « La Unuiĝo de l' « Bibliofiloj », pri kiu ni parolis antaŭ 2 monatoj ĵus aperis. Ĝi celas iĝi perilo inter esperantistoj por interŝanĝo de libroj legitaj, aŭ ĉiuspecaj kolektoj; ebligi vendon je favoraj prezoj de verkoj Esperantaj aŭ aliaj La ideo estas bona, kaj ĝia efektiviĝo povos utili al multe da samideanoj. Por sciigoj kaj specimenoj (50 c. sd.) afranke. Sin turni al Sr^o E. Philippe, Auby (Nord), Francujo.

Ankaŭ aperis « Stelo Kataluna », monata revuo pri scienco, arto kaj Esperanta movado; en kataluna kaj Esperanta lingvoj. Ĝi brilu daŭre kaj regule sur nia ĉielo: en Hispanujo, 1 Sm; en aliaj landoj 1,20 Sm. Rambla S. Isidoro 30: Igalado (Barcelona).

La « Alĝeria informilo », journal por informoj pri Alĝerio, ĉefe en franca lingvo. Jare 2,40 Sm. 8 rue d'Isly, Alger, Algérie.

Per ĉarma ilustrita *Brosureto-Cirkulero*, la klubo de San Sebastian (Hispanujo) sciigis nin pri fondo de Esperanta Agentejo.

La januara trimonata bulteno de grupo esperantista de Creusot (Francujo), 18 place Schneider, enhavas interesajn sciigojn pri la federacio de l' burĝonaj grupoj.

Skotlanda Pejzaĝo. Tre luksa albumeto kun multaj ilustraĵoj kaj klarigoj angle kaj Esperante (24 sd., ĉe Higgie kaj K^o, Rothesay, Skotlando).

Librairie de l'Esperanto

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn NE esperantajn.

NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.

NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.

NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l'Esperanto 15, Rue Montmartre Paris.

(Internacia esperantista librejo)

LA INTERNACIA TRINKAĴO

VISKIO ESPERANTO

Registered Trade Mark

N^o 270,042

Marque Déposée

N^o 13,195

Registered label N^o 272,434

LA OFICIALA VISKIO DE LA TRIA KONGRESO

Buchanan, Scott & C^o

Garthland Street

GLASGOW (Skotlando).

ARTISTA AŬ LITERATURA VIVADO

La kantsocieto de moravaj instruistoj.

Eble kelke da niaj legantoj jam aŭdis pri tiu Societo, kiu ĉiujare plibonfamiĝas.

Antaŭ du jaroj mi ricevis pri ĝi kelkajn sciigojn de nia sindona samideano Julo Proházka, instruisto en Luka apud Litovel.

Nu, dum la lastaj Paskaj libertempoj sin aŭdigis tiu societo en Parizo. Tio, kion mi sciitis pri ĝi instigis min ĉeesti unu aŭdadon, kaj mi ne bedaŭris mian decidon, tute kontraŭe.

Krom la plezuro de la kanto, mi ĝuis tre interesan paroladon de distinginda ĉeĥa ĵurnalisto, S^{ro} Henri Hantich el Praha, kiu afable redaktis, speciale por « Tra la Mondo », la kelkajn ĉi sube tradukitajn liniojn.

Malgraŭ la inklinoj realaj kaj nekontesteblaj por la kanto kaj la danco, kiuj karakterizas ĝenerale la slavajn gentojn, la nacia muziko ĉeĥa havas rilate malfruan devenon: ĝi komenciĝas antaŭ unu duonjarcento, ĉirkaŭe.

Ĝiaj naskigo kaj disvolviĝo estas intime ligitaj kun la literatura movado de la ĉeĥa nacio, kiu kreskis kaj fortikiĝis precipe de la oficialigo de la regnarto liberala de 1860. La historiistoj, la poetoj, la artistoj ekverkas por trafi idealan celon: la releviĝo de la ĉeĥa popolo, kiun subpremo dujarcenta estis droniginta en la nokton de la nacia senkonscienco.

Unu rimedo tre potenca por ekvekigi kaj fortikiĝi en la popolo la senton pri ĝia nacia individueco estis la kanto: la populara kanto, kiu tra multaj okazaĵoj vivadis en la naiva animo de l' popolo.

Estis tiam tempo, dum kiu poetoj kaj literaturistoj fervore konkuris por kolekti la kantojn de l' popolo, kaj por alblovi novan vivadon al tiuj poeziaj floretoj de la pasintaj tempoj.

En Bohemujo, Erben; en Moravujo, Susil; en Slovakujo, Kollár, precipe, kolektis kaj notis zorge la popularajn kantojn. Tiuj naivaj kampaj poezioj, paŝtkantoj, plendarioj, mallongaj kaj kortuŝantaj amrakontoj montras plej bone la simplecon kaj freŝecon de la popola animo. Kiam oni estis kolektinta tiujn trezorojn, oni estis atentigata de la natura beleco de tiuj melodioj; oni komencis ilin ŝati laŭ ilia ĝusta valoro; estis inter ili gajaj, ĝojemaj; aliaj, pli multaj, melankoliaj, montrantaj dolĉan rezignacion de la dolorigita animo.

Tiuj lastaj devenis precipe de Moravujo. Oni vidis tiam okazi eksterordinara fenomeno, aĵo ne antaŭpripensita: kulturante

la popolan kanton, oni eltrovis la vivigan fonton de la nacia muziko. Talentistaro, atente aŭskultante la potencajn vibrojn de la popola animo, entreprenis interreti tiujn naturajn defluojn gentaĵojn per siaj personaj verkoj. Bohemujo havis sian Smetana, Moravujo sian Krízkovsky.

La unua — apud kiu oni devas ankaŭ citi, inter multaj aliaj, Ant. Dvorský, F. F. F. Novák, Joseph Suk — sukcesis krei la ĉeĥan muzikon, sendepandan de iuj ajn fremda skolo.

Krízkovsky posedas admirinde la senton de la popola muziko. Li verkis por la multaj kant-

societoj naskitaj post 1860, alprenante preskaŭ sen ŝanĝoj, krom iafaje harmoniigo, la melodiojn tiajn, kiaj ili ekzistas ĉe la popolo.

Janáček, lia posteulo, prunteprenas pli ol li de la moderna scienco, tiu precipe de la harmonio kaj de la ritmo. Li atingas ankaŭ variecon per instrumentuzo, kiu en Moravujo estas grava agento en la kantoj, per kiuj oni akompanas la dancojn; ĉar, kurioza detalo, la ĉi tiulanda kutimo estas kanti, dancante.

La muzikistoj akompanantaj ludas sen muziko, tute instinkte; fakto bone montranta la realan senton de la popolo morava por la harmonio.

Janáček sin konformigas zorge al la ritmo de la parolata lingvo, kaj proksime sekvas la melodiajn modulojn voĉajn en diversaj elfluoj de la tuŝita animo, en la ĝojo kiel en la ĉagreno, en la amo kiel en la malamo. Lia harmoniigo estas kolorplena kaj alfarigis perfekte al la melodio. Lia plej grava komponaĵo, la filino de l' ministro, enhavas la melankolian rezignacion de tiuj plendindaj homoj, sub tero vivantaj.

Joseph Nešvera, distinginda kapelmajstro, sin konigis precipe per siaj religiaj komponaĵoj.

Resume, ne produktinte ĝis nun grandan verkon, la moravuja muziko estas tamen interesa kaj originala; kaj pliriĝigos iam la muzika literaturo per paĝo, kiu povos esti enkondukita nur de la Ĉeĥoj de Moravujo.

Kun granda intereso la publiko aŭdis la specimenojn de tiu muziko kantatajn, laŭ tute karakteriza arto, de la kvindek aĵoj de la kantsocieto de moravaj instruistoj. Jen dolĉaj, jen viglaj kaj potencaj, la voĉoj harmoniigis sub la lerta konduko de S^{ro} Vah, la distinginda kantistarestro.

Presitaj tradukoj de l' paroloj ebligas al la publiko taksii, kiel la muziko konvenas por la paroloj.

La societo vojaĝas ĉiujare, kaj jam aŭdigis sian repertuaron (kantaron) en Moravujo, Bohemujo (Praha) Aŭstrujo, (Wien), Francujo (Paris, Nancy), Germanujo (Leipzig).

La aŭstra ministro de la publika instruado, post la granda sukceso atingita en Wien (1906) promesis monsubtenon oficialan, kiel kompenson por la oferoj faritaj, kaj la diversaj malfacilaĵoj renkontitaj de tiuj neprofitemaj kaj laŭdindaj artistoj.

Mi havis la plezuron trovi, inter ili, unu esperantiston, kun kiu mi iom parolis post la koncerto. La intereso, kun kiu ĉirkaŭis kaj aŭskultis nin liaj kunuloj, ebligas esperi, ke de tiu kelkminuta konversacio rezultis kelkaj novaj adeptoj. Al niaj ĉeĥaj amikoj la zorgon kulturii tiun semon.


A. MONTROSIER.

Certe ili ne mankos la okazon, estante tre lertaj propagandistoj. Ni konigu, ke « Bohema Unio Esperantista » sukcesis igi tute favora por Esperanto la organizon Komitato de la Ekspozicio jubilea en Praha, organizita por honorigi la sesdekan jaron de la regado de Imperiestro Francisko Jozefo I^a. La komitato eldonis tre belan ilustritan propagandan folion en Esperanto. La « Unio » preparas vojaĝon de Dresdeno al Praha, por la gekongresanoj, kaj zorgas pri ĉiuj aranĝoj, sciigante, per la aludita folio, ke la vojaĝo daŭras nur 3 1/2 horojn. Certe multe da esperantistoj dezirus koni la belan urbon. (Ni sendos 3 ekzemplerojn de tiu bela folio laŭ peto sur respond — poŝtkarto). Por helpi la propagandon de niaj bohemiaj amikoj en la bohemiaj mezoj, ni publikigos en la Junia numero artikolon pri Praha, de konata bohema literaturisto, Lubos Jerabek.

« T. L. M. »

* * * * *

Ni enpresas hodiaŭ la portretojn de de Amicis kaj Carducci, kiujn ni ne povis enpresii kun la artikolo de S^{ro} Buquet pro manko de spaco.



EDMONDO DE AMICIS.

Esperantistaj prezentadoj.

La 26^{an} de Aprilo sekcio de la Pariza grupo (sekcio de la III^a urbokvartalo) donis gravan esperantistan feston en la salono de la granda franca ĵurnalo «*Le Journal*». La teatra prezentado estis tute rimarkinda. Ofte, pro afableco, oni trouzas entuziasmajn esprimojn en nia anaro, sed la vorto estas vere taŭga. Laŭ la ĝusta kaj justa esprimo de S^{ro} Carlo Bourlet, prez. de la Pariza grupo, S^{ro} Hugo-Schweitzer, prez. de la sekcio kaj liaj sindonaj kunlaborantoj, povas esti fieraj pro sia laboro, kaj se estus multe da tiaj sekcioj en la urbo, Parizo estus baldaŭ tute varbita al Esperanto.

Mi ne povas detale raportiti pri la programo kaj la interpretoj, kiuj facile min pardonos, ĉar ili celis nur, labori por Esperanto, sen priokupo pri persona sukceso. Mi citos nur «*Novelo*», nova dramo de Jordi d'Alguer, «*Strangaĵo*», amuza sceno kun faro de karikaturoj laŭ kelkaj konataj esperantistoj, ludita de F. Pujula kaj Torné; fine la ĉefa peco de l' programo estis «*Esperanto-Revue*» de S^{ro} F. de Ménéil, kiu montrigis vere bonega revuisto, kio estas malofta talento.

Lerte la aŭtoro uzas la aŭtomobilon vojaĝon de la Werner ĉirkaŭ la mondo, organizita de «*Le Journal*», por prezenti al ni la revukondukanton (G. Chavet).

Bedaŭrinda nevala haltu kondukas lin precize en *Esperantujon*, stranga okazo! kie la malfeliĉulo troviĝas ĉirkaŭata de ĉiulanda anaro parolanta lingvaĵon tute nekonatan de li. Feliĉe alvenas la *Ruĝa Broŝuro* (F^{ino} M. Bruker), kiu sub eksteraĵo pleje alloga kaj per voĉo ĉarma sin proponas kiel gvidlibron al la ravata vojaĝanto. Dank' al ŝi, baldaŭ Esperanto ne plu enhavas misterojn por li, nek la ĉefaj okazintaĵoj de la pasinta jaro; precipe, kompreneble, tiuj, kiuj interesas la Parizanojn preterpasas sur la scenejo; kaj ĉiuj aludoj kaj vortludoj — kaj ili estas legio — estas tuj salutataj de gajaj aplaŭdoj. Aliaj transiras la limojn de la urbo, kaj trovus ĉie saman sukceson: la kongresoj kaj memorlibreto, la spesmilo, la konkursoj *Revue*, la restoracio de l' Esperanto, kies kelnoro (S^{ro} R. Schweitzer filo) tute honorigas la jam juste faman restoracion de la Rue Mazarine per sia sprita ludado; fine aludoj al la reformprojektoj montris, kiel granda estas la fervoro de ĉiuj ĉeestantoj por Esperanto.

Malbonan kvaronhoron travivis la spritludanta reformisto (R. de Lajarte), kies ĉiuj esperoj ruiniĝas, kiam li vidas kion fervore ĉiulandaj esperantistoj salutas la verdan stelon, kiu levigis sur la «*nokta ĉielo*», deklamante kun malofta talento, delikatajn versojn de S^{ro} de Ménéil. Tiu ĉi, kiel komponisto kaj verkisto estis, post Esperanto, la dua triumfanto de la kunveno. Specialajn gratulojn meritas la agema sekretario de la sekcio, S^{ro} Aŭg. André, pro la bonega organizo de la teatra prezentado. Tiaj festoj valoras pli por la propagando ol longaj ĵurnaldisputoj. Tiu ĉi estis vere ĉarma, familia; tia estis la sento, kiun ĉiuj esprimis forirante de la granda teatra salono, tro malgranda por la ĉeestantoj.

La feston daŭrigis granda vespermanĝo prezidata de Generalo Sébert, apud kiu ĉeestis kelkaj urbaj aŭtoritatoj, Rektoro Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Federacio de Bourgogne, kaj la prezidantoj de la pariza grupo kaj de 30 grupoj urbĉirkaŭaj. Kun granda simpatio parolis pri la festo la gravaj ĵurnaloj «*Le Figaro*», kies konata kunlaboranto E. Berr estas tute akirita al nia afero, «*Le Journal*» kaj «*Comœdia*».

STELETO.



GIOSUE CARDUCCI.
Laŭ la itala pentristo Milesi.

La «*Kvaro por la Kvara*» decidis anstataŭi la teatrajn internaciajn prezentadojn de la antaŭiaj kongresoj, per teatraĵo ludota de profesia aktoraro. Ni tute ne samopinias kiel la instigantoj de la projekto pri la propagandiga valoro de tia prezentado. Eble ĝi estos efika en Germanujo, sed ĝi perdos la grandan valoron porpropagandan de la antaŭiaj, kiuj tiel impresis la profesiajn ĵurnalistojn, ĉiam pli kaj pli multaj ĉe niaj kongresoj. Plue, ne ŝajnas bone, ke, konstante pli-grandigante la biletprezon, oni kontraŭe malpligrandigas la nombron de la distraĵoj (1) pri kiuj ĝi rajtigas.

Kio ajn estas kaj estos, ĉar estis necese ne kontraŭstarigi projekton opiniitan bona de tiuj, kiuj havas la gravan respondecon de malfacila kongresa organizado, mi ne volis kontraŭparoli la aferon, kiam tia faro estis kapabla ĝin malutili. Cetere eĉ nun mi ne volas insisti, kvankam tamen estus multe por diri Ĉiam sciigema pri aferoj kapablaj interesi niajn legantojn, mi preferas doni ĉi sube kelkajn sciigojn pri «*Ifigenio en Taŭrido*», la ĉefverko de Goethe elektita por la priparolita prezentado. La traduko estas nun verkata de L. L. Zamenhof.

Goethe estis filozofa tiom, kiom artisto kaj poeto. Ne estas do mirige, ke li estis altirita de la greka arto kaj antikva idealo, kaj ke li decidis provi verkon, en kiu li kantus ian iaman heroon. Ŝajnas, ke la memoro pri liaj junecaj pasioj instigis lin elekti unu el la plej puraj, senpekapaj, virgaj fizionomioj el la antikva teatro: Ifigenio. Tiu Ifigenio, li prunteprenis de Eŭripido; kaj ne sole li ĝin elektis inter liaj herojn kiel la plej puran, sed li volis ankaŭ ŝin alligi, modernigi, plidoligi, similigi al la figuro, kiun lasis al li por ĉiam Ŝarloto kaj Frederikino.

Jen kiel parolas pri ŝi S^{ro} Gaston Rageot, la distinginda franca literaturisto, kiu paroladis pri «*La virinoj ĉe Goethe*» ĉe la «*Université des Annales*» (2).

«*Ifigenio*, kiel oni scias, estis metita sur la altaron, por esti oferata de sia patro Agamemno; sed, lastamomente, ŝi estas mirakle savita de Diano, kiu transportigas ŝin sur malproksiman marbordon, en Taŭrido, la lando de l' Scitoj. Tie, ŝi estas akceptita de la landa reĝo, Toas', kiu, grandanime, komisias ŝin kiel pastrinon de Diano. Sed la landa leĝo estas tre severa; ŝi devas oferi ĉiujn fremdulojn tie albordigitajn, kaj inter tiuj fremduloj subite alvenas ŝia frato Oresto, akompanata de Pilado. La plendinda Oresto mortigis sian patrinon, ĉar tiu ĉi estis malfeliĉiga por lia patro Agamemno.

Ifigenio estas forkuranta kun Oresto, kaj je la momento kiam reĝo Toas' ekkonas la foriron, kaj estas frapota la forkurantojn, Minervo — alia diino el la maŝino (deux ex machina) — sin intermetas por okazigi miraklon, kaj ebligis, ke la junaj gegrekaj reiru en sian patrujon.

El tiu historio, en kiu la gedoj tro ofte sin intermetas; Goethe konservis preskaŭ nenion; precipe la internan dramon, kiu okazas en la animo de Ifigenio, li celas montri al ni. Ho! tie, vi ne vidos amon, senton; ni estas malproksime de *Werther*. En la momento kiam Oresto kaj Pilado volas foriri de la Taŭrida marbordo, Ifigenio, la pura kaj senkulpa Ifigenio eksentas konsciendubon. Ŝi kunparolas reĝon Toas'on, ne povas mensogi, kaj la reĝo barbara, kiu ŝin alprenis, ekscias de ŝi mem la veron; la morala angoro (premdoloro), kiu kondukas ŝin al tiu konfeso, konsistigas la tutan intereson de l' dramo.

En sceno de la kvina akto, ŝi alvokas al la grandanimeco de la reĝo, kiu eble ne havos la kruelecon, malhelpi la foriron de l' Grekoj. La sceno estas speciale bela, ne tre drama sed kortuŝanta kaj emociema. Ifigenio, idolana virgulino sin montras egala al la plej puraj sanktulinoj laŭ Rafaelo.»

En Orléans, la 13^{an} de Majo, kaj en Beaune la 10^{an} okazis ankaŭ tre sukcesintaj prezentadoj. En tiu lasta oni ludis sukcese la spritan sceneton: *Milito kaj Paco*, de Sam. Meyer, aperintan en nia 10^a Numero (1^a Jaro).



(1) La prezentado estas organizata de konata germana aktoro Emanuel Reicher, kaj unu loko kostas 25 fr. (10 Sm.) krom la kongresbileta prezo: 12 fr. 50 (5 Sm.).

(2) Ni jam ahndis pri tiu grava institucio, kiu celas instrui la junulinojn pri ĉio kapabla plivastigi ilian konon pri la spiritaĵaj aferoj. Tiu ĉi jaron havis lokon, en la programoj, dek parolad-
oj pri la literaturo kaj literaturo germanaj.



DIVERSAĴOJ



Kelkaj miroj en Nov-Jorko.

de William E. BAFF (Usono).

La unuan tagon de januaro 1898, aro da urboj kaj vilaĝoj loĝataj de ducent ĝis du milionoj da personoj kuniĝis, kaj tial estis nomataj « Pli granda Nov-Jorko ». Havante ne malpli ol trimilionoj tricent mil da loĝantoj kaj tricent sesdek kvadratmejl-ojn, la amerika ĉefurbo estas post Londono, plej proksime, la plej granda urbo en la mondo. Eĉ nun ĝi estas la dua urbo en la mondo laŭ la grandeco. Do, kial ne estas tiu ĉi urbo la unua plej granda urbo? Kompreneble, tial ke Londono jam estis urbo du mil jarojn, antaŭ ol la unua homo metis siajn piedojn sur la teron de « Manhatan Insulo ». Tamen, la malnova ĉefurbo de la mondo, kun siaj sesmilionoj ducent mil da loĝantoj, en 1898 ne havis la duoblon de la loĝantoj de la unua plej granda urbo en la Nova Mondo.

Londono, oni memoru, havas sescent okdek ok kvadratmejl-ojn, tio estas pli multe ol Nov-Jorko certe havos antaŭ la sekvanta generacio.

La loĝantaro de Nov-Jorko pligrandiĝas po 315 personoj ĉiutage, dum la pligrandiĝo ĉiutaga kaj senceŝa de la loĝantaro en Londono ne povas atingi pli ol 230.

En 1898, Paris (Parizo) — mi priparolas pri tiu ĉi dato, ĉar ĝi estas la plej grava — kun du milionoj sescent mil da loĝantoj kaj kun 173 kvadratmejl-oj je amplekso, havis la trian vicon antaŭ Berlin. Oni diras, ke Ĉikago, amerika urbo, estas tute la konkuranto de Berlino; sed la karto montras, ke Ĉikago nun havas pli grandan nombron da loĝantoj. Tamen la germana urbo havas nur 25 kvadratmejl-ojn da amplekso, dum la alia urbo kuŝas sur 187 mejloj da amerika ebena tero.

La « Pli granda Nov-Jorko » havanta formon de triangulo troviĝas sur la Atlantika Oceano, la ĉefa parto havas 18 mejlojn longe; la supra pinto estas super la « Hudson Rivero »; la plej granda amplekso havas 35 mejlojn. Tamen la 360 kvadratmejl-oj, kiujn la urbo havas, estas nur makuleto sur la vasta amplekso de la amerika lando. Eĉ la malgranda « Rod Insulo » (Rhode Island) la plej malgranda ŝtato en la amerika Unuiĝo, havis, en 1898, amplekson baldaŭ kvarfoje pli grandan ol Nov-Jorko. La ŝtato de Nov-Jorko nomita « La Imperia ŝtato » povas esti dividata je 132 tiaj urboj ne ĝenante la tri aliajn grandajn urbojn en la sama ŝtato. Je amplekso kaj grandeco, tiu ĉi makuleto estas tiel negrava, ke se observanto starus sur la luno, Nov-Jorko vidiĝus kiel pingla kapo, 10 futojn malproksime. Kaj tamen, laŭ tiu elmonro, la tero mem ŝajnus kvarfoje pli granda ol la luno.

Sed en tiu ĉi limigita spaco estas amasigitaj tiom da personoj kiom en ĉiuj Amerikoj: dektri kolonioj, antaŭ 1776, kiam Ameriko apartenis al Anglujo. Tiam la « Pli granda Nov-Jorko » havis nur 80.000 da loĝantoj. Nun, la loĝantoj en tiu ĉi urbo pro sia plimultiĝo certe egalas la tutan loĝantaron de la 13 novaj amerikaj ŝtatoj kaj teritorioj, kies amplekso estas la duono de la lando, kaj pli ol 3000 foje pli granda ol la ĉefurbo Nov-Jorko.

Se oni enliniigus tiun ĉi armeon da personoj, ŝultro ĉe ŝultro, en unu vico, etendiĝus tiu ĉi lasta ĝis St Louis (Lui), urbo milmejl-ojn trans la lando.

Se oni marŝigus duope la samajn loĝantojn antaŭen kiel por parado, ĉiutage kaj ĉiunokte dum tri semajnoj, eĉ tiam la lasta paro ne estus forpasinta de la observanto. Se tiuj ĉi 3.300.000 da loĝantoj estus samspace disloĝigitaj en la tuta urbo, ĉiu familio havus lotaĵon da 100 futoj, kaj eĉ restus sufiĉa spaco por stratoj, parkoj kaj komercaj entreprenoj.

Sed estas tre kompreneble, ke ili ne estas loĝigitaj egale! Kontraŭe, ĉar unu sesono de Nov-Jorko enhavas la kvaronon de la tuta loĝantaro.

Troviĝas parto konsistanta el 32 amerikaj « acres'oj (1) » sur malsupriĝa « Manhatan Insulo », kiu estas certe la plej dense loĝata spaco en la mondo. En siaj apartamentoj 1000 loĝantoj de la ĉefurbo estas amasigitaj sur ĉiu « acre ». Se la cetero de la loĝantaro estus amasigita en sama spaco, kiel tiuj ĉi lastaj, tiam la urbo Nov-Jorko enhavus preskaŭ la nunan loĝantaron de la Unuiĝitaj Ŝtatoj de Ameriko!

Ĉirkaŭ 10.000 loĝantoj mortas ĉiutage. Tio ĉi egalas unu ĉiujn sep minutojn nokte kaj tage. Se oni permesus, ke nur tri kaleŝoj akompanu ĉiun enteriĝon, oni trovus, ke la loĝantoj mortintaj havus funebran paradon longan je 650 mejloj en unu sola jaro. 20.000 infanoj naskiĝas en la urbo ĉiutage. Naskiĝas do 250 infanoj ĉiun tagon aŭ unu ĉiujn ses minutojn. Se oni promeniĝadus kune tiujn ĉi infanojn, por ke ili ĝuu freŝaeron, oni vidus, ke la vico de la infanveturiloj etendiĝus de urbo « Hudson » ĝis « Aebano », ĉirkaŭe 150 mejlojn (vidu la karton).

« Pli granda Nov-Jorko » estas ja la plej kosmopolita urbo en la mondo. Reprezentantoj el ĉiu lando en la mondo loĝadas tie ĉi. El ĉiu urbo alvenas homoj, por loĝi en tiu ĉi granda urbo. En 1898, la tuta nombro da alilanduloj atingis 1.250.000 da personoj, kaj iliaj infanoj atingos baldaŭ 2.500.000, aŭ pli ĝustadire la du trionojn de la tuta loĝantaro en tiu ĉi urbo.

(1) Acre (akro), angla termezuro valoranta en Anglujo 40 areojn.

La Germanoj staras unue sur la nomaro de 1' fremdlandaj enmigrintoj, atingante preskaŭ 900.000. Plej proksime venas la Irlandanoj: 850.000. Poste, venas 120.000 Angloj, 105.000 Rusoj, la plimulto el ili Hebreoj, 100.000 Italoj, kaj 50.000 Skotlandanoj. Tamen estas precipe la Hebreoj, kiuj naskas la plej grandajn familiojn. Ŝajnas, ke nenia alia lando, krom Rusujo, sendis, sendas, kaj sendos tiom da Hebreoj en Nov-Jorkon; certe, ja, estas ke la Hebreoj tie ĉi progresas pli mirinde ol la ceteraj alilanduloj, sekve se oni trairus la straton « Broadway' on », kredeble la plej grava kaj komerca el la stratoj en Ameriko, oni trovus, rigardante al la multaj surskribaĵoj, kiuj ĉie altiras la okulojn, ke « Broadway » strato similas absolute la ĉapitron « Levitikus » el la hebrea Biblio.

La amerika ĉefurbo estas ankaŭ la plej granda irlanda urbo en la mondo. Dublino, la ĉefurbo de « Smeraldo Insulo », kiel Irlandujo estas ofte nomata, havis en 1898 malpli ol duono da irlandaj loĝantoj de Nov-Jorko. Post Berlino, Nov-Jorko estas ankaŭ la plej granda germana urbo en la mondo. Ĝi havas preskaŭ tiom da Germanoj kiom Hamburgo kaj Muniko kune. Ĝi ankaŭ havas pli grandan nombron da Angloj ol « Portsmouth », pli da Kanađanoj ol Londono, pli da Rusoj ol « Vilna », pli da Francoj ol « Aix ». Ĝi havas preskaŭ tiom da Skotlandanoj kiom « Leith », da Italoj kiom « Venecio », da Aŭstro-Hungaroj kiom Presburgo, kaj Skandinavaĵoj kiom « Bergen ».

La vaporfervojoj kaj stratovojoj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo (mi priparolas pri pli granda Nov-Jorko en 1898) povas atingi, en nerompita linio, ĝis la ŝtato de « Omaha » ĉirkaŭe 1400 mejlojn. La vaporfervojoj solaj povas atingi, duoblavoje ĝis « Lago Champlain » (Ĉamplen), de Nov-Jorko mem. Estas necese

vidi la karton por elkompreni tion ĉi perfekte. La altaj vojoj farus duoblan kunigan vojon kun Nov-Haveno, en la ŝtato « Connecticut » (Konektikut). La stratovojoj en opa linio atingus ĝis Ĉikago, ĉirkaŭe 292 mejlojn de Nov-Jorko.


La stratfervojoj havas 95.000.000 amerikajn dolarojn da kapitalo. Iliaj 5.000 vagonoj ĉiujare povus surruli 35.000.000 mejlojn da spaco, t. e. preskaŭ la longon de ponto inter la suno kaj la luno. Ili transportas 480.000.000 da veturantoj ĉiun jaron, aŭ mezonombre 130.000 ĉiutage. Tio ĉi estas ĉirkaŭe 12 procentoj el la tuta veturanta komerco de la vaporfervojoj en la Amerika Unuiĝo.

La altaj fervojoj havis en 1898, 120.000.000 dolarojn da kapitalo. Iia mezonombra vagonara mejlir-cblo estis en 1898, 14.000.000 da mejloj. La interspaco, kiun veturas la 1.600 vagonoj ĉiun jaron, estas ĉirkaŭ 65.000.000 mejlojn; oni povas diri, ke tio ĉi egalas perfekte kvar vojaĝadojn dum unu semajno de la suno al la luno. Ii transportas 25.000.000 da veturantoj ĉiujare aŭ mezonombre 100.000 ĉiun tagon.

Kelkaj el la plej gravaj komercaj sistemoj de naciaj fervojoj alcentriĝas en la ĉefurbo. Se oni enhavigus en Nov-Jersey tiujn, kiuj kunigas Nov-Jorkon per tramo, tiuj ĉi linioj de fervojoj mezurus tri kvaronojn de la interspaco ĉirkaŭ la mondo. Ĉirkaŭ 1000 veturantaj vagonaroj formoviĝas el la urbo sur tiuj ĉi fervojoj ĉiutage. Ili transportas 40.000.000 da veturantoj ĉiun jaron, aŭ du kvinonojn de la tuta veturanta komerco per vaporfervojoj en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. La ŝarĝo, kiun tiuj ĉi lastaj formovas estas triono de la tuta ŝarĝado per fervojoj en la lando.

Dairigota.

WILLIAM BAFF,
Usodo.



RAPIDEGA DOMKONSTRUADO.

Konstrui belan, higienan, nepereebelan domon, enhavantan sufiĉe da ĉambroj por du familioj, en nur malmultaj tagoj, je malgranda kosto, tio estas la revo de la famega usona elpensisto, Thomas A. Edison!



LA RAPIDKONSTRUA DOMO DE EDISON.

Tiun ĉi la tuta mondo jam bone konas, pro lia fonografilo, elektra lumigilo, kinematografo, k. t. p., sed eble lia memoro plej trezoriĝas pro la plano baldaŭ efektiviĝota, konstrui multegajn malkarajn hejmojn, kiuj estos, samtempe, preskaŭ palacoj!

Sinjoro Edison jam montras modelon, kaj nun konstruigas la necesajn modelilojn, per kiuj oni povos modeli konkretdomon tre rapide.

La diversajn partojn de la modelilo, konstruitaj el fero, oni kovros per nikelo brile polurita. La starigo de la modelilo postulas nur unu tagon, la miksigo kaj enverŝo de la konkreto okupas la duan tagon, post kiu estas nur necese atendi ĝis la materialo sufiĉe hardiĝis, antaŭ ol formovi la modelilon ĝis la loko de alia domo.

Kompreneble la kosto de la modelilo estos sufiĉe alta, ĉirkaŭ 50,000 — 100,000 sm., laŭ grandeco de la domo dezirata, sed, ĉar la aparato estos uzbla por senfina nombro da domoj, tio ne multe gravas.

Antaŭ ol enverŝi la konkreteton, oni fiksos laŭdezire la diversajn akvo- kaj gastubojn, metalfadenojn, ferajn fortigilojn, k. t. p., por ke la tuta afero — plankoj, muroj, tegmentoj, ŝtuparoj, kornicoj, kolonoj, eĉ la ban- kaj laviloj estu finita en unu fojo!

Ferkonkreto sendube estos la konstrua materialo de la estonteco, ne nur pro la malkareco sed ankaŭ pro la fakto, ke domo konstruita el ĝi daŭros por ĉiam, estas senbrua, ne postulas koloron kaj estas tre facile purigebla.

Sinjoro Edison diras, ke li povos konstrui domon laŭ la formo montrata de la bildo po 2,000 sm., kaj nun organizas kompanion, por komenci la konstruadon. Kompreneble oni havas diversajn formojn je diversaj prezoj.

CHARLES E. RANDALL,
Seattle, Wash., U. S. A.

La Aglino.

Fablo de FREDERIKA BREMER, Svedujo.

Frederika Bremer estis fama sveda verkistino kaj unu el la unuaj batalantinoj por la feminismo en Svedujo. Per tiu ĉi fablo, eldonita en 1865, ŝi ankaŭ prikantatas, per la priskribo de la kuraĝa flugado de l'aglino, la kuraĝajn pionirinojn, kiuj kontraŭstarantaj la mokadojn de l'homamasoj unue ekbatalis por la liberigo de sia sekso.

Estis mateno, kaj la suno hele briladis. La fratino de l'aglo sidis en sia nesto sur ŝtonego, kaj sopirante rigardis en la hela aero, kaj levis nevole siajn ankoraŭ neprövitajn flugilojn. Fiere ŝia brusto levigis.

« Al la suno! Alten al la suno! » tiel sonadis interne de ŝi. « Kial mi ne vidus la gloru'on de pli proksime, kaj ne banus mian okulon en ĝian lumon, kaj ne trinkus forton el ĝiaj radioj? Kial ne estus prikantata la sunirado de l'aglino kiel tiu de l'aglo? Mia rigardo estas forta, miaj flugiloj junaj, mia volo fortika; alten, alten, al la suno, al la suno! »

Ŝi flugis. Mateno, sunlumo, freŝeco de l' senfina aero, kaj sento de juneca forto plenigis ŝian bruston per ĝojo.

Por iom ripozi, vidi ĉirkaŭ si, kaj ĝui la novan, belan vivon, ŝi metis sin sur la pinton de kverko.

En la arbaretoj ĉi malsupre ĉiuspecaj birdoj kolektiĝis. Ili estis rimarkintaj ŝian kuraĝan flugadon.

« Trilili, bone, bone, trilili! » ĝojkantis la alaŭdoj; « daŭrigu, aglino! Vi estos honoro por via sekso! »

« Kuraĝon, nobla ardeo kriis, kuraĝon, mia amiketo! »

« Vivu, fratino, vivu, » la blankaj cignoj kantis, naĝante inter verdaj insuletoj.

« Kraŭk, kraŭk! » la korniko kartavis, tia rapideco estas danĝera; gardu vin, kara fraŭlino! »

« Turtulutu! « la kolombo kveris, (1) kial vi serĉas la feliĉon tiel malproksime? Restu hejme en via nesto, varmigu ĉe via edzo, kovu viajn ovojn, kaj donu manĝaĵojn al viaj idoj, kaj vi vivados dum multaj, multaj jaroj! Turtulu! »

« Hui! klevit, klevit! » strigo kriis, « jen fariĝos danĝero! »

« Jen fariĝos danĝero », sturnoj kaj papagoj ripetis.

« Iras bone, iras bone! » aro da gajaj anseroj kriadis, « tre bone! »

Sed juna, nobla aglo sidiĝis apud la flanko de l'aglino, kaj diris dolĉe kaj karese:

« Via iro estas bela, sed la vojo longa kaj via forto tro malgranda ankoraŭ. Permesu al mi, vin akompani; kiam vi ŝanceliĝos, mia flugilo subtenos vin, ĝi ombrigos viajn okulojn, kiam la suno volos ilin blindigi, kaj kiam danĝero vin minacos, aŭ kiam vi laciĝos dum la irado, mi vin kondukos en mian trankvilan neston, kiu estas tie sur la malproksima monto, kaj vi restos ĉe vi! »

Dankeme, sed malakceptante, la aglino mallevis

sian kapon antaŭ la nobla birdo. « Mi volas esti sola, » ŝi diris; « solega mi volas krei mian sorton! » La kriojn de l'aliaj birdoj ŝi apenaŭ aŭdis. Ŝi povis nur aŭskulti la alvokon en sia propra brusto: « Alten al la suno, al la suno! »

Kaj ŝi ree levis la flugilojn. Ebrügita per suno, freŝeco kaj ĝojego ŝi flugis pli kaj pli alten kaj malproksimegen de la aliaj. Malĝoja kaj melankolia, la juna aglo skuis siajn flugilojn, deturnis sian rigardon de la fieregulino, elektis por si alian edzinon, kaj kondukis ŝin en sian neston, kiu estas sur la malproksima monto.

La aglino flugis solega kaj vidis la sunon de pli proksime. Sed ho ve! Tiam subite ŝiaj okuloj blindiĝis, ŝia kapo turniĝis, kaj ŝi ne plu vidis klare sian vojon. Ŝi flugis ankoraŭ, sed nevole ŝi malsuprenflugis teren. Ĉasisto vidis tion, kaj celis per sia mortiga pafilo; li pafis kaj la kuglo trafis la koron de l'aglino.

Ŝi flugis ankoraŭ, sed ne plu sunen, ŝi flugis al la profunda, profunda arbaro. Ŝi sentis sin trafita de l' morto. Profunde en la plej malluman arbaron ŝi flugis, kaj la malluma arbaro fermiĝis ĉirkaŭ ŝi, kaj kaŝis ŝin por ĉies rigardoj.

Sur branĉo de pino sidis la aglino kun sangumita brusto kaj kun larmoj en la estingiĝanta okulo. « Estas bono por mi, » ŝi mallaŭte diris, « ke al la aglino estas permesite morti nebedaŭrata kaj sen apudestantoj. »

Tiam si aŭdis la kolombon dirantan al ŝiaj idoj: « Miaj filinoj, ne faru kiel la aglino. La fera malsaĝulino certe estis bruligata dum sia irado. Restu hejme en via valo, en viaj trankvilaj nestoj, kaj vi vivados dum multaj, multaj jaroj. »

« Mi eraris! » la aglino diras (sed fiere la koro ŝvelis sub la vundo) « mi eraris en mia juneca kuraĝego, kaj estas punita. Sed trankvile mi suferos mian sorton. Aliaj estu pli feliĉaj! Mi ne plendas. La sunon mi tamen vidis de pli proksime. »


« Klevit, klevit! » la strigoj akre kriadis. « Klevit! » ripetis sturnoj kaj papagoj. « Iras bone, iras bone! » moke kantadis la ansera amaso antaŭenflugante super la arbaro.

« Mi mortas », la aglino diris kun estingiĝanta forto. « Mi mortas, sed la sunon mi vidis de pli proksime! Feliĉo al mi! »

Kaj de la branĉo, kie ŝi sidis, ŝi falis sur la teron, kun etenditaj flugiloj, kaj ŝi ne vivis plu!

Tradukita de
FREDRIK SKOG,
el Falun (Svedujo).

(1) Blekis kolombe.



A-A-Ĉu! Aŭ la terna fianĉiĝo.

Ili enamiĝis unu je la alia dum preskaŭ unu jaro. Li diris al ŝi vendredon posttagmeze, ke li vizitos ŝin dimanĉon fruvespere, ĉar li intencas, al ŝi diri ion tre gravan, kaj doni donacon. Per virina antaŭ-sento, ŝi divenis, ke grava afero okazos, kaj ŝi atendis la horon kun dolĉa emocio.

Li alvenis ĉe ŝin ĝustatempe sed tute ne en la stato dezirita de ŝi. La antaŭtagon malvarmumego atakis lin, kaj liaj okuloj ruĝiĝis kaj ŝvelis, kaj lia nazo kreskis ĝis preskaŭ la duoblo de la kutima grandeco, kaj brilis kiel pordfrapilo. Strange, la fraŭlino estis tiel same. Ŝi kondukis lin en la parol-ejon, kaj sen antaŭa ceremonio ili sidiĝis kune sur la sofono. Li elprenis sian naztukon, kaj viŝis sian nazon. Tio memorigis ŝin pri ŝia deviĝo; kaj ŝi tuj faris tiel same. Li premis sian manon en unu mano, kaj sian naztukon en la alia. Tiam li parolis:

« Suzadjo, bi vedas, hodiaŭ dokte, por paroli al vi, pri io pli kara... a... a... a... u... u... (tuja uzo de la naztuko submetas la ternon)... pli kara al bi ol la viv... o... o... a... a... u... a-ĉu... a-a-ĉu. » (1) Momenta paŭzo. « Bi terure balvarbubis », li klarigis solene.

« Bi adkaŭ », ŝi respondis.

Momenton ili dediĉis al la uzo de la naztukoj, kaj tiam li daŭrigis.

« Karulido, seddube vi vidis la tutaĉ teĉpod kiel bulte... u... u... u... a (la naztuko ree savis lin)... kiel bulte, bi pedas pri vi. Ĉiud horod de la tag' aŭ dokto bi... a... a... u... u... a-ĉu... a-a-ĉu ».

Ŝi viŝis siajn okulojn — kaj poste sian nazon, kaj honeste penis ŝajni amema, sed pro la akveca stato

de tiuj kaj la fajreca brilo de tiu ĉi, ŝi vidigis neallogan mienon.

Sed li ne rimarkis tion.

« Suzadjo », li rekomencis, ekpremante sian manon fervore, kaj tenante sian naztukon egale serioze, « kio estas la vivo seb la abo? De dio!... Karulido, ĉu vi, ĉu vi povas abi bid sufiĉe bode, esti bia... a... a... a... a-ĉu!... ĉu vi iĝos la bia, tute la bia? » li spiregis.

« Jes, Hedriko bi ja tio fariĝos ».

Li altiris ŝin al si, metis la ringon ĉirkaŭ ŝian fingron, kaj tie ili staris kune, siajn ruĝiĝintajn okulojn duonfermante en dolĉa sankta ravo.

« Bia kobpatidda karulido suferas pro balvarbubo », li murmuris simpatie.

« Sabe kiel bia Hedriko », ŝi kviete paroletis responde. « Vi devas predi bedikabedtod pro tiu balvarbubo hodiaŭ vespere », ŝi diris.

« Kaj vi tiel sabe ».

« Jes, kaj vi devas trebpi la piedojd ed varbad akvod! »

« Bi ja tiel faros; kaj vi trebpos la viajd ».

« Bi ĝid faros ».

« La Ĉielo bedu vid, bia karulido, bia abidda karulido », li diris premante ŝin ĉe sia brusto; kaj poste li eliris en la mallumon; kaj ŝi restis momente ĉe la pordo, kaj aŭdis lian karan voĉon sonantan en la nokta aero, dum li forpaŝis:

« A-ĉu!... a-ĉu! »

El la « A. I. Reciter-Part 4 »
tradukis W. M. PAGE,
Edinburgh.



ĜI NE ESTIS POMO.

Ni vivas dum epoko kiel eble plej multe informiĝema, kiu konsideras kredindaj, en la estinta kiel en la nuna tempo, nur la faktojn neneiĝeblajn kaj precize elmontritajn. Dank' al la progreso de l' historia kritiko, ĉiutage peco de l' centjara vualo subleviĝas, kaj la vero aperas ekster la duonombro, en kiu ĝin envolvis la legendo.

Tiunmaniere, nune, amerikana scienculo, profesoro Ollivier Jonhson de la Leland Stanford University, ĵus eltrovis, ke la frukto prezentita de Eŭo al Adam' en la Tera Paradizo ne estis, ne povis esti pomo, kiel oni kredis.

La serpento — li estis nomata Sammaĉl kaj estis dika kiel kamelo — konsilis Eŭon, ke ŝi gustumu la malpermesitan frukton. Ŝi ĝin mordis, kaj trovis ĝin bonega, kaj, ĉar ŝi estis bonkora, ŝi admonis Adamon partopreni al sia plezuro. Tuj, la vizaĝo de l' Eternulo aperis, kolerega, ekster orflavkolora nimbo (2), ordonis ke ili kovru sian nudecon, kaj forpelis ilin el la Paradizo. Sen monrimedoj, ili vagadis sur la tero, kaj mortis havante 900 kaj kelkajn jarojn.

Kaj profesoro Jonhson certigas *mordicus*, ke la riparolata frukto ne povis esti pomo, ĉar la pomo

esta frukto de l' modera terzono, kaj la Edeno kuŝas sur la tropika terzono. Plie, la hebrea teksto uzas nur la generikan (3) (specaran) terminon: frukto, latine pomum, kiun la franca tradukinto tradukis per *pomo*, ĝuste sammaniere kiel la senpripensaj lernantoj tradukas la faman *numero Deus impare gaudet* per la *numero du ĝojas, ke ĝi estas nepara!*

Do, ĝi ne estis pomo.

Kio povis esti tiu bonega frukto? Profesoro Johnson estas necerta, ĉu ĝi estis citrono, banano aŭ figo... En Firenzo, sur la pentraĵo de Cranach estas figo, ja, ke Eŭo proponas al Adam'. Estas certe, ke la figo estas bongusta frukto, kaj la simbolo prezentata de ĝi, tiel dolĉa kiel evidenta. Kaj la folio de figujo superas la folion de vinberujo per tiu rimarkinda (aŭ senegala) supereco, ke ĝi estas pli « vestanta ». El ili Eŭo faris por si robon, unu el tiuj roboj malkonvenetaj kaj beletaj, kiuj, kvazaŭ senintence, por tiel diri, substrekas kion ili devus vuali, kaj, kiel postulas la modo, ne teniĝas sur la korpo.

El « Le Matin ».

Esperantigis
J. FIZE.

(1) Grava avizo: tio ne estas « Ido ».

(2) Itale: nimbo; latine, angle kaj germane: nimbus; france: nimbe = krono el radioj.

(3) France: générique; angle: generic; germane: generisch; hispane kaj itale: generico.

La organizo de la germanaj loĝioj.

La framasonoj de la granda loĝio de Francujo vizitis Berlin'on kaj ĉeestis, la 12^{an} de majo, ĉe solena kunsido de la granda loĝio « Royal-York ». Tiukaze ni enpresas kelkajn sciigojn pri la emoj de la germanaj loĝioj. Ŝuldataj al la afableco de S^{ro} Ch. Barthel, el Frankfurt', vicprezidanto de « Internacia Framasonaro ».

Jam dum nia ĉeesto ĉe la memorinda Boulogne'a kongreso (Aŭgusto 1905) kelkaj neframasonaj esperantistoj petis min, verki artikoleton pri la suprenomita temo. Mi malzorgis pri tio, ĉar mi tre bone scias, ke ekzistas personoj, kiuj vidante la nomon framasono tuj pensas, ke tio signifas kontraŭbalanton de la religio; kompreneble ili eraras, almenaŭ rilate la germanajn loĝiojn al kiuj, male je kelkaj aliaj sistemoj, la okupado pri politiko aŭ religio estas severe malpermesita. La ĉef celo de la germanaj framasonoj estas la veko kaj la konservado de la kompatemo kaj bonfarado por ĉiuj, ne konsiderante la religiajn aŭ politikajn konfesojn. Do estas facile kompreneble, ke post la masoneco de niaj du unuaj imperiestroj, Vilhelmo I^a kaj Frederiko III^a, la nuna protektanto de la germanaj framasonoj estas la nevo de nia nuna imperiestro. La ceremonioj kaj simboloj — prunteprenitaj ĉe la malnova angla masonaro — kiuj estas preskaŭ samaj en la tuta mondo, estas miksaĵo el tiuj de la mezepokaj templo-kavaliroj kaj el la masonoj, kiuj en la 14^a centjaro konstruis la belegajn katedralojn en Anglujo. Generale la germanaj loĝioj konas nur 3 membrajn gradojn (lernantoj, kunuloj kaj majstroj); tamen kelkaj el ili laboras ankaŭ en pli altaj gradoj. La nombro de germanaj framasonoj estas ĉirkaŭ 52,000 kun 1055 bonfaremaj institucioj (publikaj). En Germanujo ni ne havas « Nacian grandloĝion » ĉar kelkaj loĝioj laŭ la prusa sistemo ne akceptas israelidojn, kaj tia kaŭzo ĝis nun malhelpis la formadon de Nacia grandloĝio. Ifoje la germana framasonaro laboras en « Grandloĝioj » (8) dividitaj en 670 loĝioj. Ankaŭ en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko laboras 92 germanaj loĝioj. Eble niaj francaj pacifistoj precipe interesiĝos pri la fondo de la unua germana loĝio en Paris, la 15^{an} de Decembro 1906. Fakto tre ŝatinda por la alproksimiĝo de la du grandaj najbaraj nacioj. Kiel patronon niaj framasonoj havas St. Jean-Baptiste, kaj ili ĵuras sur la biblio, konservi la sekretojn de interkonatiĝo (ĉar aliajn sekretojn ni ne havas, malgraŭ la frenezaj diroj, kiujn oni ofte aŭdas). Generale oni povas diri, ke la framasonaro estas granda internacia societo, disvastigita en la tuta mondo. Ĝiaj membroj havas la agrablajn, esti akceptataj ĉie t. e. en aliaj fremdlandaj loĝioj kiel veraj fratoj kun kortuŝanta amikeco. Kompreneble laŭ mia opinio, la framasonoj devus plenumi la gravan rolon,

labori por amikigi kaj kunrilatigi ĉiujn popolojn, kaj ĉie subteni la pacifismon. (En tiu okazo, tamen kelkaj fremdlandaj sistemoj devus forigi la politikon el siaj organizoj). En somero 1902 mi ĉeestis en internacia framasona kongreso en Genevo. Mi devas konfesi, ke la interkompreniĝo estis tre malbona, oni parolis ekzemple en franca lingvo, tradukis la paroladon malbone en germanan lingvon. Kia diferenco grandega je la memorinda Boulogne'a kongreso, kie oni fondis, mirigita de ĝia sukceso kaj konvinkita, ke Esperanto estus la sola vere uzebla interkomprenilo, internacia framasona societo: Esperanto Framasona.

Tiu ĉi societo ĉiam kunvenas dum la internaciaj esp. kongresoj. Ĝi kunvenis dum 1906 en Genevo, kaj la lastan jaron en Cambridge. Ĝi *nur* celas plibonigi la interrilatojn inter la diversnaciaj loĝioj, kaj labori (ne tuŝante la politikan aŭ religian demandon) je la internacia frateco kaj pacifismo.


La internacia framasona oficejo en Bern (Svisujo) korespondas ankaŭ en Esperanto, kaj enpresas artikolojn *en Esperanto* en sia gazeto; la uzo de Esperanto kiel kongreslingvo dum la estontaj framasonaj kongresoj devus esti enkondukata kiel eble plej baldaŭ; ĝi ŝparus multe da tempo kaj tre helpus al la internacia kompreniĝo.

Ni ne forgesu fine nomi la Esperantajn tezojn de Prof. D^r Zimmer, konata framasono en Berlino, kiu diras interalie: « La lingvo latina estis en la mezepoko la ligilo inter la popoloj. Ne estas eble retrovi tiun uni-

formecon revenante malantaŭen al la dogmoj de la mezepoko kaj al la lingvo de la scienculoj, sed nur antaŭen irante al la kulturo, kiu havas siajn fundamentojn en la kreo de nova organizo, kiu esprimas sin en lingvo komuna, komprenata de ĉiuj personoj kulturataj: la moderna penso bezonas propran formon; la ligilo ne povas plu esti la franca lingvo, kiel ĝi estis antaŭ centjaro kaj duono, nek ia alia vivanta lingvo, ĉar la sama profito donata al unu sola popolo kaŭzus gravan domaĝon al la interesoj de la aliaj popoloj. Restas do nur artefarita lingvo neŭtrala, ĝi ne devas anstataŭi la lingvojn de la diversaj popoloj, sed devas esti por ĉiuj ĝenerala rimedo interkompreniĝi. La solvon de tiu ĉi problemo liveras Esperanto, jam multfoje provita en la praktiko ».



S^{ro} BARTHEL,
Prezidanto de I. Framasona Societo.



Fragmentoj de manuskripto de la VIa jarcento

Oni konis de longe la jenajn dirojn — historion veran aŭ sakran legendon — de la apostola epoko: « Malgranda reĝo nomita Avagair aŭ Abgar, reĝis en Edesso, Armenia urbo, trans Eŭfrato. Tiu reĝo, nomita toparko de la historiistoj, estis sendinta delegacion al Marinus, tribuno de Cezaro, guberniestro de Fenicio, Palestino, Sirio kaj Mezopotamio. La ambasadoroj, dum sia vojaĝo, aŭdis pri Jesuo kaj la mirindaĵoj, kiujn li plenumis. Eĉ ili havis la ŝancon, lin renkonti, kaj vidi per siaj propraj okuloj, ke li sukcese kuracas ĉiuspecajn malsanojn dank' al sia sola aŭtoritateco. Post sia reiro, ili rakontis al reĝo Abgar la miregindajn aĵojn de si viditajn pri Jesuo de Nazareto, kaj la nepardonema malamo de la Hebreoj, kiuj, pro envio, provas igi lin morti. Nu nekuracebla malsano suferigis la toparkon de Edesso. Aŭskultante tiun rakonton, li ekesperis, ke, se li povus lin vidi, li resaniĝus ».

Tre klera sciencisto, Abato Gaffre, kiu jam verkis belan libron pri la *Portretoj de Kristo*, kaj kiu preparas alian, havis bonŝancon eltrovi, en alta Egipto, kuriozan grekan manuskripton de la sesa jarcento, sur gazelan haŭton, kiu enhavas ne sole novajn dirojn pri la interrilatoj de Jesuo kaj Abgar, sed ankaŭ aron da kuriozaj kolorbildoj, sur ora fundo, sufiĉe bone konserviĝintaj. El tiu manuskripto, aĉetita al malnova kopta familio, estas elĉerpitaj la ĉi subaj eliraĵoj.

Jen la letero d' Abgar la Justa, portita al Jesuo de la sendito Ananias :

« Abgar, reĝo toparko de la urbo Edesso, al Jesuo, homo bona kaj kuracisto, aperinta en Jerusalemo, saluton :

Mi aŭdis pri ci kaj ciaj resaniĝoj; ke, sen medikamentoj nek herboj, per cia sola parolo, ci havigas : al la blinduloj, la vidon, al la lamuloj, la marŝon, al la surduloj, la aŭdon; ke ci forpelas la malpurajn demonojn, kaj ke ci resaniĝas la suferantojn. kaj ke virino sangoperdanta de jaroj estis liberigita cin tuŝante, kaj ke ci revivigas la mortintojn; kaj aŭdinte pri tiuj aferoj al ci rilataj, ho Sinjoro, mi ekhavis en mia koro la konvinkon, ke ci estas. ĉu Dio mem, ci kiu plenumas tiujn farojn, ĉu la filo de Dio malsuprenirinta de la Ĉielo, por plenumi tiujn farojn; kaj pro tiu motivo mi cin petegas, per tiuj leteroj kaj preĝoj, ne malŝati veni ĝis mi, por liberigi min de la malsano, pro kiu mi suferas, kaj ke ci faru por mia urbo la neceson, por ke neniu el miaj malamikoj povu ĝin kapti kaj detrui. Oni ankaŭ diris al mi, ke la Hebreoj koleras kontraŭ ci, kaj volas cin mortigi. Nu, mi havas modestan urbeton, kiu sufiĉos por ambaŭ. Estu sana, ordonu, ho Sinjoro, Dio mia ».

La papiruso surhavas poste la respondon senditan de Jesuo al Abgar.

« Ci estas ja feliĉa, ho Abgar, same kiel cia urbo nomita Edesso; ci estas ja feliĉa, ĉar ci konfidis al mi, kvankam ci ne vidis min; kaj la sano estos al ci por ĉiam redonita. Rilate al mia iro ĉe cin, estas necese, ke mi plenumu la tutan mision, por kiu mi estas ĉi tien sendita, kaj, ĝin plenuminte, ke mi

Religia histori

La vivo de Jesuo estas nun, de E. Gasse, esperantigita. kiun Renan sekvis en sia multfaka verkaro. Ni eliras Revuo, de nia kunlaboranto (1) profesoro P. Buquet.

Renan estas precipe delikatalo. Li anstataŭas la Religion per la sento de Dio. Oni ŝuldas tion, kion oni ŝuldas al Renan, kiel historiisto de Religioj. Oni ŝuldas al li antaŭ ĉio, ke li interesigis la gravan kaj tutmondan filozofaron kaj eĉ la popolan homamason al temoj antaŭ li zorge rezervataj por la kleruloj, tio estas por la teologiistoj. Li ĉie elvolvas jenan kuriozan penson: Dio estas ne farita sed iom post iom farota. Kiel Dio efektive foriĝas, per la historio li volas komprenigi tion. Li neniam, neniel kontraŭbatalas la Religion. Li multfoje kontraŭstarigis kontraŭ la malvera opinio, kiu oni povus eltiri el lia verkaro. Li ne skribas laŭ la maniero de kontraŭbatalisto. La batala metodo necesigus ilojn, kiujn li ne tuŝas mem.

Tia metodo estas kontraŭ la scienca spirito. La fundamentan temon de la Teologio, t. e. la rivelita kredo, li nenial traktas. Pri tio li nek jesas nek maljesas. Li nur rakontas. Sed li rakontas tiamaniere, ke la problemo ŝajnas por li antaŭsolvita. La historio de la homaro estas por li vasta amaso, kie ĉio estas esence maledgala kaj malsama, sed kie ĉio estas el la sama ordo,

(1) La morala edukado, kaj la historio religia. Coenobium-Lugano. (Okt. 1907). La filozofio religia de Renouvier (Feb. 1908).

resupreniru al mia Patro, kiu min sendis. Poste mi sendos al ci unu el miaj disciploj (partianoj), Taddeo aŭ Tomaso, kiu cin resanigos.... Ĉar mi forlasis Ĉielon, kaj malsupreniris, por savi la homan genton, kaj mi loĝis en virga korpo, por nenigi la restadon en la paradizo perdita de Adamo, kaj mi malaltigis min, por vin pligrandigi».

Tiu letero, donita al Ananias, la sendito de Abgar, estis sekvata de kelkaj linioj certigantaj feliĉon por la reĝo, kaj por la portanto, se li restus pura kaj neriproĉinda.

Multaj miniaturoj tute rimarkindaj akompanas la tekstojn, kiujn la bildklarigoj kompletigas.

Abgar sentis grandan ĝojon pro la letero, kaj, ĉar Jesuo ne povis lin viziti, li deziris almenaŭ havi lian portreton, kaj pri tio sendis al li alian misiiston.

«Nu Abgar sendis misiiston lertan en la pentrarto, por fari la portreton de Sinjoro Jesuo; kiam li alvenis Jerusaleme, Jesuo lin akceptis, kaj, ekparolante kun li, diris al li: «Ho homo, ci estas spionanto»; kaj tiu ĉi respondis: «Mi ne estas spionanto, Sinjoro, sed la sendito de Abgar, toparko de Edesso, deziranta rigardadi Jesuon la Nazaretanon, kaj fari lian portreton». Jesuo rekomendis al li, eniri en la Sinagogon, kie li instruas la homamason. La sendito supreniris sur altan lokon, rigardadis la vizaĝon de Jesuo, dezirante ĝin fiksi sur tolon; sed dia forto malhelpis lin, sukcesi. Jesuo, diveninte la intencon de la sendito, alvokigis lin apud sin de sia disciplo Taddeo aŭ Tomaso, kaj, elĉerpinte akvon, li lavis sian vizaĝon; poste, prenante tukon, li viŝis sin. Lia dia imago presigis sur la tolon. Li ĝin remetis tuj al la konfidulo, kaj lin sendis al Abgar. Faro admirinda, supernatura kaj tuta inda de Dio».

Eusebo de Cesareo kaj Moïso de Koreno, historiistoj de la kvara jarcento, jam rakontis tiujn faktojn proksimume sammaniere. Protektita de la dia portreto, la misiisto alvenis en Edesson, kaj reĝo Abgar resaniĝis.

La multvalora reliko, paladiumo (ŝirmilo) de Edesso, restadis en tiu urbo, eĉ post la regado de l' Musulmanoj, kiuj ĝin religie konservis ĝis la mezo de la deka jarcento.

En la jaro 944, Romano Lecapene, sukcesis ricevi la konsenton de la emiro d' Edesso pri transporto de la Sankta bildo kaj de la letero de Jesuo en Konstantinopolon, kie ili estis akceptataj la 16^{an} de Aprilo 945 kun soleneco raportita de la grekaj kronikoj.

De Konstantinopolo la portreto iĝis posedaĵo de la Genovaj doganoj ĉirkaŭ la dekkvara jarcento. Nun ĝi estas konservata en la preĝejo Sankta Bartelemio, en tabernaklo je sekreto, provizita je ses seruroj, kies ŝlosiloj estas gardataj de ses el la ĉefaj urbaj familioj. La Pentekostan tagon kaj la du sekvantajn tagojn, tiu tabernaklo estas malfermita, kaj la imago de Edesso prezentata al la adorado de l' fideluloj.

PASTRO RUSPOLI.

laŭ Renan.

as do konvena tempo por aldoni kelke da klarigoj pri la filozofia-historia metodo, ajn vidpunktojn el artikoloj publikigitaj en COENOBIIUM, nova metafizika-religia


ĉio devenas de la samaj kaŭzoj, ĉio obeas al la samaj leĝoj. Tiujn ĉi leĝojn li serĉas sen ia alia intenco, ol malkovri la veran nuancon de tio, kio estas.

Nenio povas devigi lin anstataŭi tiun rolon modestan sed fruktoportan de kontraŭdiristo. Tiu ĉi facila rolo donas al la verkisto la favoron de la popola aŭskultantaro, de ĉiuj, kiuj sin kredas devigataj, kontraŭstarigi la batalon je la batalo. Por tiu ĉi batalmetodo, kies necesecon li ne maljesas, «Voltaire plene sufiĉas». Ĝi estas la esprimo iom maldelikata kaj mondfama inter la kleruloj, kiun oni riproĉas al li: «Voltaire sufiĉas!» Tamen Renan mem iom eniras la vojon, kie Voltaire senĉese marŝadis.

Li agrable mokas la miraklon laŭ la metodo de Voltaire mem: «Cum grano salis», kiel li ŝatas ofte diri. Li laŭ tekste skribas: «Miraklo en Parizo, antaŭ scienculoj lertaj solvus «tiom da duboj! sed Ho ve! tio ĉi neniam okazos.»

Kompreneble tiu ĉi Voltaire'ana polemiko ne estas eltirita el la popola eldono de la vivo de Jesuo. Sanginte nenion ajn, kiel li diras en la Avertio, pri sia penso, li sukcesis forigi ĉiujn lokojn, kiuj estus eble kaŭzontaj malkomprenigojn, kaj li kredas tre juste, ke multe da veraj kristanoj trovos en tiu ĉi libroto nenian ofendon.

P. BUQUET.



rilata al portreto de Kristo.

NUNTEMPAĴOJ

Kongreso de l' Arto ĉe la Lernejo.

« Ne estas vere, laŭ ni, ke popola homo estas kondamnita de l' naturo, vivi kun frunto klinita al tero, neniam levante la okulojn al regionoj altaj kaj lumaj. Arto, afero aristokrata, kia blaskemo ! »

Tiel parolas S^{ro} Pecaut kaj Baude en libro titolita *Arto*. Ili esprimas opinion eble diskuteblan, sed ĝenerale akceptitan, almenaŭ en Francujo. Sajnas al mi, ke tiu ĉi opinio instigis la projekton de l' kongreso okazonta en Lille (Francujo) la 6-9 de junio proksima kun la nomo *Unua kongreso nacia de l' Arto ĉe la Lernejo*.

La kongreson aranĝas la nacia societo *La arto ĉe la Lernejo*, fondita en la jaro 1907^a sub la patroneco de S^{ro} Prezidanto de la Respubliko. La dirita societo klarigas sian celon per la jenaj epigrafaĵaj vortoj: « Lernejo saniga, aerumita, racie konstruita kaj meblita, alloga kaj ornamita. Edukado de l' gusto, iniciato de l' infano al la beleco de la linioj, koloroj, formoj, movoj kaj sonoj. »

La societa estraro estas: prezidanto, S^{ro} Senatano Couyba; du unuaj vicprezidantoj, S^{ro} F. Buisson, deputato kaj S^{ro} Gasquet, direktoro de l' unuagrada Instruado en Francujo; ĝenerala sekretario, S^{ro} Léon Rivot, « 26 quai de Béthune à Paris. » Por la Lille'a sekcio: prezidanto, S^{ro} Lyon, rektoro de l' Akademio, Lille; ĝenerala sekretario, S^{ro} Emile Gavelle, direktoro de la lernejo de la Belartoj, 2 strato de la Deule, en Lille.

Ne duba estas la neceseco de tiu ĉi kongreso, diras unua cirkulero. Efektive la tuta nacio franca nuntempe formiĝas per la lernejo, kiu ĉiutage pliboniĝas en la rilato estetika, konstrua kaj ornama. Estas grave utile, ke oni klerigu pri novaj rimedoj fari la gustoedukadon, daŭrigi la superecon de franca industrio kaj iniciati la infanojn al la arta beleco. Kompari, juĝi, diskutadi tiujn ĉi rimedojn, kaj diskonigi la plej bonajn estas tasko de moderna penso, vere nacia edukada afero, en kiu partoprenos ĉiuj amikoj de l' infano kaj lernejo.

Jen estas, laŭ dua cirkulero, la demandoj esplorotaj de la diversaj sekcioj en la kongreso: lerneja arkitekturo kaj ornamo, rilatoj de l' arto lerneja kun higieno, interna ornamado de la lernejo, la lerneja ĝardeno, organizado de l' instruado pri la historio de l' arto en la duagrada kaj pedagogiaj lernejoj, formado de l' gusto muzika ĉe la infanoj, organizado de l' kanto-instruado en la unuagrada lernejoj, elparolado kaj deklamo, la demando de l' arto ĉe la lernejo kaj la estonteco de l' arto en la modernaj demokratioj, ĝenerala propagando.

Kaj nun aŭdu la voĉon de la kompetenteco kaj afableco, tiun de l' juna kaj aktiva ĝenerala sekretario de l' kongreso, S^{ro} Em. Gavelle. Mi demandis lin, kial la urbo Lille estas elektita kiel kongresloko, ĉu venos ministro, kiu prezidos la kongreson, ĉu oni elmontros materialon, ornamaĵojn, artaĵojn; ĉu oni aranĝos modelan lernejon, kaj per kiuj rimedoj la societo de l' Arto ĉe la Lernejo intencas plenumi sian edukadan programon.

Jen la respondoj. Oni prefere kunvenos en Lille pro diversaj

kaŭzoj: graveco, arta riĉeco, geografia sido, ĉiuspecaj rimedoj de l' urbo, sed precipe influo, agemo, persisteco de S^{ro} rektoro Lyon, prezidanto de la regiona sekcio.

Se la ministro de la Belartoj ne persone venos, li certe estos reprezentata de grava estro. Cetere ne duba estas la ĉeesto de kelkaj eminentuloj: artistoj, administrantoj, profesoroj, k. t. p.

Kiu prezidos la kongreson, oni ne scias, sed kiu ajn estos prezidanto, la diskutado restos sur praktika kampo. Neniam oni forlasos el la vido la popolan edukadon. Ni celas rezultaton atingeblan eĉ en ne riĉaj kaj kamparaj komunumoj.

Pri ekspozicio de lerneja kaj lernada materialo, S^{ro} Gavelle timas embarasantan amasiĝon. Oni pli deziras montri farataĵojn ol faritaĵojn. Pro tio oni aranĝos idealan klason en vilaĝa lernejo, kien la kongresanoj ekskursos.

— Unu vorton, mi diris. Arto en lernejo elvokas elspezigajn mirindaĵojn alkröĉitajn sur la muroj...

— Ne timu. Ni montros, ke arto kaj riĉeco ne estas aferoj nepre kunligitaj. Oni povas konstrui, mebli, ornamati lernejon, kaj sekve loĝejon, per modesta monelspezo. Bone elektu la kolorojn, harmoniigi la nuancojn, doni al la mebloj plaĉan formon, estetike dismeti la objektojn, ŝati la belecon simplan, kunlinon de la simpla boneco, ĉu tio ne estas arto?

Por trafi sian celon, la societo intencas krei filiojn, organizi paroladojn, verki aŭ verkigi elementan lernolibron, interkonsenti kun fabrikistoj, kiuj preparos taŭgajn ŝmiraĵojn kaj kolorilojn liverotajn « laŭ dolĉaj prezoj » (malkare). La rimedoj estas diversaj kaj ankoraŭ en stato de projektoj.

S^{ro} Gavelle estis fininta, sed ne mi. Ŝovante sub lian rigardon la lastan numeron de « *Tra la Mondo* ».

— Jen estas la ĵurnalo, kiu raportos en Esperanto pri la kongreso. Ĝi estas legata en la tuta mondo. Ĝiaj ĉoj atingas oficialajn regionojn. Vidu tion ĉi, vidu tion...

Vi divenas tion, kio sekvis. Ni longe interparoladis pri Esperanto. Jam pasis unu horo. Oficisto malfermetis la pordon, kredeble por liberigi la kompatindan sekretarion jam intervjuitan de tri Lille'aj ĵurnalistoj.

— Bone, bone, post momento!

Kaj ni daŭrigis nian diskutadon. Kiam mi prenis forpermeson, kaj S^{ro} Gavelle rekondukis min tra vestibloj ornamitaj per antikvaj statuoj, forta manpremo sentigas al mi, ke, dank' al « *Tra la Mondo* », altan estimon ĵus akiris Esperanto. Vojirante hejmen mi pensis:

— Kiu scias? Eble « *Tra la Mondo* » iam enketos pri la Arto ĉe la lernejo... en ĉiuj landoj, kaj utilos la gravan societon. Fine mi vidis en revo multajn regionajn sekciojn, kies estroj fariĝas esperantanoj je l' nomo de l' Arto.

Kaj mia revo ne ankoraŭ finiĝis.

F. DURIEUX,

Instruisto, direktoro de la « Montesquieu » lernejo en Lille, Esp. 6466.



Ĉar ni parolas pri aferoj koncernantaj lernejojn, ni sciigu, ke ni ĵus ricevis la artikolon, pri kio ni jam parolis, verkitan de S^{ro} Shuster, Sekretario de la Publika Instruo en Manila. Tiu interesa verko estis afable transportata, kun pezaj klišaĵoj, de nia distinginda samideano D^{ro} Yemans, kiu ĝin tradukis.

Ni citu ankaŭ kuriozan artikolon: la Skota lingvo kaj Esperanto, speciale atentinda por niaj britaj legantoj, precipe la skotaj, kiu aperos en la proksima Numero.

* * *

Niaj legantoj, kies abono finiĝas kun la Junia N^o estas insiste petataj tuj reaboni. Tiuj, kiuj reabonos antaŭ la 30^a de Junio (30^a de Julio ekster Eŭropo) ricevos kiel premion « Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj », aŭ ili povos senpage sendigi donace, al iu ajn el siaj amikoj kapabla aboni « *Tra la Mondo* », malnovan kvaronjaron de la gazeto.

Ni konsilas, ke oni uzu la okazon de la reabono por mendi la bonegan « *Poŝhorloĝon l'Espero* ». (Por sinjoroj, 30 fr. = 12 sm.; por sinjorinoj, 45 fr. = 18 sm.)

Reabonoj kun mendoj pri Poŝhorloĝo devas esti sendataj senpere al nia administracio.

Muziko dolĉigas la morojn, oni diras, ĝi estas ankaŭ bonega propaganda rimedo, kaj ni konsilas la akiron de la ĉi subaj verkoj.

La Vagabondino, sprita poezio de nia bonega kunlaborantino, F^{ino} C. W. Oxenford, muziko de Celia Burleigh: Senpaga aldono al la Aprila n^o de « *La Vagabondisto* », monataĵo de « Esperantista Vagabonda Klubo ». La poezio instigas vere iĝi ano de klubo, kies aninoj estas tiel ĉarmaj, spritaj, gajaj, ridemaj... iom mokemaj kaj flirtemaj, kiel decas al virinoj. Instiga ankaŭ estas « *La Vagabondisto* » pro sia enhavo kaj siaj monataj kovriloj, kiuj formas konservindan kolekton. Ni konsilas, ke oni petu la regularon al F^{ino} K. Thornton, la sindona sekretariino, 11 Wilbury Avenue, Hove, Sussex, Anglujo per respondpoŝtkarto. « *La Vagabondino* » estas akirebla kontraŭ 60 c. afr. sama adreso.

Kuŝas Somero, madrigalo, poezio de E. de Kanałossi-Lefler. — *Mi aŭdas vin*, poezio de Leono Zamenhof. Por ambaŭ, muziko de nia konata komponisto F. de Ménéil. 1 fr. ĉe Hachette kaj K^{io}. — *Esperanto*, kvarvoĉa kanteto, vortoj de James Blaikie, Muziko de R. H. Saxton, 30 c. (12 sd.) ĉe « British Esperantist. »



Iom pri la veturado kaj la transportiloj en Madejro.

Madejro estas insulo apartenanta al la Portugaloj kaj ĝia ĉefa urbo estas Funŝalo (Funchal). Same kiel la kanariaj insuloj Madejro estas de vulkana fariĝo, amaso el krateroj, rokoj kaj intermontoj. Dum la daŭro de jarmiloj kaj jarcentoj la interspacoj pleniĝadis per la bruna, cindra sablo, kaj ili nun estas uzataj por la kulturo de sukerkano, vino kaj tropikaj fruktoj.

Ne la vino, kiel oni ĝenerale supozas, estas la ĉefa produkto de Madejro; sed la sukerkano. Ĉie sur la insulo oni vidas la flaveverdajn sukerkanejojn, kaj oni ĵus komencis la rikolton.

La kulturado de sukerkano nur estas ebligita per tre alta protekta imposto.

Se la portugala registaro subite enlasus en la insulon la sukeron senimposte, mi kredas, ke la plimulto el la loĝantoj bankrotiĝus.

La klimato estas nekompareble bela kaj do, ne miru, ke tiom da nordeŭropanoj ĉiujare vizitas tiun terspacon, benitan de la naturo.

Tio, kio plejmulte mirigas la vizitanton ĉe lia alveno sur la insulo, estas la praeca karaktero de la veturiloj kaj transportiloj. Disrompiĝintaj rokeroj enfalis en la maron. Per la konstanta marakva suprenmalsupren levado kaj muelado la ŝtoneroj ne globiĝis kiel ĝenerale okazas, sed, ĉar ili konsistas el kristala bazalto fendigema kiel ardezo laŭlonge, ili diskformiĝis.

Tiuj ĉi bazalteroj servis al la unuaj loĝantoj de la insulo por la konstruo de la pavimoj. Ĉar ili estas tre malmolaj kaj sen akraĵoj, la pavimoj el ili faritaj estas mirinde konvenaj por la nune uzataj veturiloj, kiuj ŝajne ne aliĝis de la tempo, kiam la unuaj loĝantoj ilin enkondukis.

Oni povas bone prezenti al si la unuajn alvenintojn utiligantajn la naturajn pavimerojn, kiujn la maro elĵetas ŝajne kun nefiniĝebla malmanko, por la konstruo de la unuaj stratoj.

Ĉar ĉio bona kaj utila venis

de la monta supro, la unua transportilo estis platigita arba trunko, sur kiun oni simple metis la ŝarĝojn, kaj la tuton oni lasis malsupren glitadi sur la pavimo konstruita per la diskformaj ŝtonetoj, platflanke kune metitaj.

El la samaj ŝtonetoj, kies diametra amplekso ofte ne estas pli ol 4-5 centimetroj, estas ankaŭ faritaj la vojoj de la publikaj placoj, parkoj kaj ĝardenoj, kaj oni renkontas ofte la plej belajn, mozaike formitajn, figuraĵojn.

El 'a unu arbotrunko baldaŭ fariĝis du, kune ligitaj per ŝtipoj.

Tiu ĉi metodo de transportado kaj veturado de la praloĝantoj neniam sangiĝis, kaj la glitĉaro, kiu nun atendas la turiston ĉe la havena placo, por konduki lin al la hotelo, estas simple la evoluciĝinta arbotrunka praglitveturilo.

La nuna glitĉaro estas granda plektita korbulo el salikaj trunketoj, kiu kuŝas sur du glitiloj similaj al tiuj de niaj nordaj neĝglitveturiloj.

La korbulo enhavas du benkojn sin kontraŭstarantajn, sur kiuj povas sidi 2 personoj.

La tuto estas kovrita per baldakeno el nigra vakstolo aŭ diverskolora kanvaso. La veturantoj estas protektataj kontraŭ la suno per kurtenoj. Tiuj ĉi strangaj veturiloj estas tirataj de 2 bovoj.

Antaŭe iras bubo, kiu portas bovovoston fiksitan al tenilo por la forpelado de la muŝoj.

Se la bubo marŝas, ankaŭ la bovoj marŝas, se li haltas, tio estas signalo por la bovoj, maldaurigi la tiradon.

Kelkaj stratoj estas tiel krutaj, ke malsupren veturante oni tute ne bezonas bestan tirpovon. Tiamaniere oni glitadas ekzemple de la vilaĝo «Monte» malsupren 1800 metrojn en 12 minutoj, dum la monta dentrada fervojo bezonas iom pli da tempo, por traveturi la saman interspacon.

Per tia glitĉaro mi antaŭe ne longe faris ekskurson tre danĝeran antaŭe neniam provitan.



GLITMALSUPRENIRO ĈE FUNCHAL.

Mia edzino kaj mi intencis viziti la vilaĝon Monte kaj, ĉar mi estis leginta en la gvidlibro, ke la plej bela vojo estas tra la « caminho de meio » (1) mi obstine insistis, ke nia veturigisto eklaŭiru tiun ĉi vojon.

Spite de tio ni baldaŭ ekvidis, ke li suriris la rektan, tute ne interesan, vojon. Mi ek-koleris, kaj devigis lin obei mian ordonon.

Kiam ni atingis la supron de la monto ni devis transiri tre deklivan intermontaĵon tute ne taŭgan por glitĉaroj.

Duonvoje, kiam estis jam tro malfrue por returneniri, la veturado estis tiel danĝera, ke ne nur ni eliĝis el la ĉaro, sed eĉ devis dungi iun montaranon, por helpi nin en la transigo de nia veturilo kaj niaj bovoj. Groteska procesio: antaŭe la bubo, poste li la bovoj, poste la ĉaro kun du viroj ĉe la flankoj kaj fine — du malsaĝuloj: mia edzino kaj mi. Ofte ni devis halti, por formovi rokeroj kaj sablaĵoj malsupren falintajn dum la nokto, sekve de forta pluvado.

Alveninte en nian hotelon ĉe la alia flanko, la maljuna kelnero ne volis fidi al siaj okuloj vidante



GLITĈARO EN FUNĤAL.

nin, ĉaron kaj bovojn, transveturintajn la intermonton. « Tio neniam okazis antaŭe dum mia vivo », li diris. Vi estas la unua, kiu traveturis la « Curralinho-n » (2) per glitĉaro.

Samtempe, kiam ni alvenis, du sinjoroj de la hotelo ekvolis fari la saman ekskurson laŭ mala direkto.


Ĉiu estis portata de 2 fortaj montaranoj en hamako (litportilo), kiu pendas de dika ligna stango kuŝanta sur la ŝultroj de la portistoj.

Ili ne malmulte miris nian kuraĝon, kaj rigardis nin kvazaŭ Nansen revenintan de la nordpolusa esplorvojaĝo.

Mi nun komprenas la obstinecon kaj malsperon de nia veturigisto, kiu rifuzis iri nesurireblan vojon, sed kies portugalaĵon mi ne komprenis, kaj opiniis ruza artifaĵo por mallongigi la veturadon, ĉar mi estis fiksinta la prezon por iri ĝis « Monte ».

Madejro, en Aprilo 08.

F. ĈRFEĈ.



LITPORTILO EN FUNĤAL.

(1) Vojo de la mezo. — (2) Malgranda intermonta riverkurejo.

KIO DEVAS ESTI ESPERANTA GAZETO.

Ni baldaŭ komencos kvaran ekzistadan jaron, kaj ni petas niajn legantojn, ke ili bonvolu rigardi kun ni malantaŭen.

La celo de Esperantaj gazetoj devas esti, laŭ ni, helpi kiel eble plej multe al la disvolviĝo kaj disvastiĝo de Esperanto: liveri al la legantoj ŝatindajn verkojn literaturajn aŭ aliajn, kiujn ili ne ĝuos sen la gazetoj; konigi talentojn dissemitajn tra la mondo, kiuj restus kaŝataj sen tiuj efikaj diskonigiloj.

« Tra la Mondo » tute plenumis tiun rolon de Esperanta gazeto dum la 3 jaroj pasintaj de sia naskiĝo. Per ĝiaj multaj rubrikoj ĝi partoprenis amplekse kaj efike al la disvolviĝo de Esperanto laŭ la teknika rilato; per sia sola aspekto, sia enhavo ĉiam kiel eble plej multe internacia, ĝi jam efikis aŭ helpis grave por la disvastiĝo de Esperanto: ni rememorigas pri la atestoj presitaj, de Japanujo, Islando, Bohemujo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Francujo, k. a., kaj rilataj al uzo de « Tra la Mondo » kiel propagandilo apud eminentuloj, ministroj, k. c. La artikolo de S^o Durieux enhavas novan pruvon pri tiu rolo, kaj ni ĵus ricevis leteron kun atesto de efika propagando farita en Bosnio-Herzegovino, ĉe altaj Ŝtatoficistoj, dank'al « Tra la Mondo ». Oni ne malzorgu tiun uzon de nia organo.

Kiel montron de la intereso de niaj informoj, mi citos nur la jenan fakton: la artikolo « Oni mortigis Antikriston » estis represata france en la gravan francan ĵurnalon « Le Temps », konatan en la tuta mondo pro ĝiaj informoj politikaj kaj kronikoj pri la fremdaj landoj. Tio montras kiel estis atentinda tiu artikolo, kiun ni publikigis preskaŭ unu monaton antaŭ nia granda kunfrato. Tamen ĝi estis tute nerimarkita en nia gazetaro, krom de *The British Esperantist*. F^{ino} Lawrence, nia bonekonata angla samideano, kunlaborantino en la grava angla « Review of Reviews » ĝin rimarkis ankaŭ, kaj skribis al mi « Estas vera plezuro legi *Tra la Mondo*, kiu ne multe sin

okupas kun « Idoismo » sed daŭrigas sian vojon montrante kiel utila estas nia kara lingvo ».

Tia estis ĉiam, ja, nia celo; kaj por ĝin trafi, ni estis helpataj de kunlaborantaro vere rimarkinda, kaj senegala, kiun ni penadas pliriĉigi senĉese, kaj dank'al kiu oni povas diri, ke « Tra la Mondo » estas vera *Antologio de la tutmonda literaturo*.

Inter multaj aliaj verkoj, ĉiuj interesaj, sin trovas en niaj paperujoj tre kortuŝaj noveloj de nia talenta kunlaborantino F^{ino} C. W. Oxenford (Anglujo), prezidantino de E. Vagabonda K.; originata tre drameca romano de alia bonega kunlaboranto C. E. Randal (U. S. A.), komedio de la fama Ruso Ĉekov, tr. de nia amiko Frenkel (Siberujo), kuriozaj skizoj pri Bosnio-Herzegovino de landano, kiuj estos bele ilustritaj k. t. p. Ni komencos baldaŭ 2 enketojn, inter kiuj unu estos tre grava por la pliriĉiĝo de nia lingvo.

Inter la aŭtoroj apartenantaj al preskaŭ 40 diversaj lingvoj, de kiuj ni publikigis verkojn, estas sufiĉe da konataj, eĉ da anoj de la « Lingva Komitato » aŭ de « Internacia Scienca Oficejo »; sed ni havis ankaŭ la grandan kontentigon epresi artikolojn de *junaj, nekonataj*, kiuj per nia gazeto iĝis favore konataj.

Jen, do, la vojo trairita, la verko plenumita. Ni dezirus fari pli bone, sed la spaco mankas al ni, kaj multe da manuskriptoj atendas eliron. La aŭtoroj bonvolu pacienciĝi, kaj nin senkulpiĝi. Ĉiuj niaj amikoj iom penadu por varbi novajn abonantojn, kaj ebligi definitivan pliampleksigon, kiun ni provis la lastan jaron, sed devis forlasi pro la elspezoj kaŭzita sen kompenco.

Fine la abonantoj, kies abono finiĝas kun la monato Junio, estas insiste petataj, bonvoli tuj reboni, por faciligi al ni la ordigon de niaj libroj, kaj preparon de la nova jaro.

A. MONTROSIER.

FELIETONO

La mezurado de l' metro. (1)

Le metra sistemo por peziloj kaj mezuriloj estas jam akceptita de sufiĉe da landoj; kelkaj, tamen, pro bedaŭrinda ŝovinismo rifuzas ĝin alpreni. Ŝajnas, ke estas devo por esperantistoj, t. e. esence progresemaj homoj, labori por la efektiviĝo de tiu granda progreso.

Ni estus feliĉaj se, per la interesa artikolo de nia bonega kunlaboranto kaj amiko, ni liverus argumentojn al la amikoj de la metra sistemo. Ne sole niaj legantoj vidos, ke la ideo pri la decimala divido estas tre malnova, kaj ke malalta ĵaluzeco ne devas ĝin forigi kiel francan; sed ankaŭ kelkaj eble sciiĝos, kian heroecon devis montri la kuraĝaj scienculoj, komisiitaj por fari la malfacilajn mezurojn.

Tiaj viroj honorigas la tutan homaron same kiel la landon, kiu ilin naskis: siaflanke la homaro devas esti sufiĉe saĝa, por profiti ilian sciencan kaj iliajn laborojn.

La metra sistemo decimala estas ideo nek franca, nek revolucia. Antaŭ kvardek ses centjaroj ĥina scienculo, kiu estis difininta la longon de la dekdu bambuaj flutoj, kiuj produktas la dekdu sonojn de la ĥina gamo, decidis kalkuli la nombron da semoj de la sama kano, kiujn oni devas apudmeti laŭlarĝe, por havi ĝin tiun longon. Tiel estis difinita la ĥina futo, tio estas dekono de la ĥina ulno kaj milono de la mejlo; la futo dividita je dek = kaj je centonoj naskis la colon kaj la linion.

Ĉar la sama filozofo estis rimarkinta, ke tia fluto produktas klaregan sonon, nur se la diametro de la fluto estas ĝuste dekono de l' longo, la malplena amplekso, kiu produktis C primitivan tiel estis perfekte difinita, kaj naskis la unuon masan, al kiu oni aldonis multoblojn divideblajn po dek.

Sekve se iam Anglujo aŭ Germanujo forlasus siajn miljarajn mezurojn, kies fundamento estas arbitra, por alpreni la metran sistemon fonditan sur la neŝanĝebla Naturo, ili ne cedus al la solaj Francoj, sed ili prunteprenus aferon multafoje miljaran de ia popolo, kiu ne tute malprava estas, kiam ĝi nomas barbaraj la okcidentajn naciojn, tiel malhumilajn pro sia scienco.

La Konvencio Nacia (2) de 1791 ordonis la revizion de ĉiuj malnovaj mezuroj kaj la serĉadon de nova unuo. Ĝi deziris plenumi tiun reformon kunlaborante kun Anglujo, ĉar tiu ĉi lando ankaŭ bezonis refandi (revizi) la tiamajn modelojn de peziloj kaj mezuriloj. Tiam Francujo ĝuis la pacon kun Anglujo, kies liberamajn instituciojn ĝi admiris. Bedaŭrinde la interkonsento pri ĝi ne povis iĝi; Anglujo konservis siajn mezurojn, kaj Francujo sola entreprenis la aferon; sed dum *Buffon* proponis por fundamento alprenota la longon de pendolo frapanta la sekundon, Akademio de Sciencoj prefere alprenis partumon difinotan de meridiano sfera. Tiu entreprenado, jam komencita dum la regado de Ludoviko XIV^a — en la tempo, kiam oni kredis ke la tero estas perfekte sfera, poste daŭrigita en 1740 — per la mezurado de unu grado en Peruo kaj en Lapujo, estis praviginta la ideojn de *Newton* pri platiĝo de la tera sfero ĉe la polusoj.

Dum la politikaj okazantaĵoj rapidegis, la komisi-

itaro de Metro pasigis multajn monatojn en preparaj laboroj, nome: geografia sideo de l'unua meridiano tra Francujo, longo de pendolo sekunda, pezo de l'akvo distilita, tabelo de la malnovaj mezuriloj, kiujn novaj anstataŭos, fine konstruado de perfektigitaj iloj de astronomio kaj geodezio.

La optikaj iloj kaj la rebriligiloj estis liverataj nur ĉirkaŭ la tempo, kiam la patriotisma febrego ekscitegis la spiritojn, kaj ĉie vidis ŝajnajn malamikojn al Respubliko, aŭ, laŭ la tiama esprimo, senditojn de *Pitt et Cobourg*. Jam pamfletisto Marat plenis la tutan landon per siaj frenezaj kaj kalunnioj kontraŭ kia ajn eminentularo, nome precipe la scienculoj. La artikoloj de *Paĉjo Duchène*, la ĉefa ĵurnalo revolucia, kiuj renkontis admirantojn en ĉiu urbeteto, ofte varbis kontraŭ la komisiitaj de Metro hundaron da fanatikoj sangon soifantaj, kiuj postulis ilian kapon, kaj, se ĝin ili ne ricevis (kiel okazis pri *Lavoisier*), al ili donis eblecon pruvi kuraĝon kompareblan je tiu de l' militistoj sur la bataalkampo, eĉ kelkafoje malpli facilan.

La triangulara laboro de *Dunkerque* al *Barcelone* estis komisiata al *S.S. Mechain* kaj *Delambre*. La unua prenis por si, tial ke ĝin li juĝis malpli facila, la sudan parton ne ankoraŭ mezuritan, lasante la nordan al *Delambre*.

Li forlasis Parizon la 25^{an} de Junio 1792, kun helpanto *Tranchot*. *Delambre* estis akceptinta, kvazaŭ helpanto, la propran nevon de *J. de Lalande*, *S^{ron} Le Français*.

Tuj alveninte la duan haltejon, *Mechain* suferis malhelpaĵojn de l' oficiro komunuma, tre suspektema pro la multampleksaj pakajoj kaj la strangaj kestoj, kiujn enhavis la veturiloj de l'astronomiisto. Tie ĉi oni konjektas, ke ĝi estas agento interkonsentanta kun la fremduloj; tie, ke ĝi estas Ludoviko XVI^a forkuranta; aliloke la administranto tre malklera ne scias legi, el la reĝa dokumento kiu rajtigas la scienculon, ion alian krom la liliflora stampajo, memorigilo de leĝo malamata. Li neniam estus konfesinta sian eraron, se ne estus alveninta la tiea kuracisto, por klarigi al la amaso kunveninta, ke la scienculo estas sendita por glora verko kuraĝiginda kaj helpinda.

(1) Resumita, kaj tradukita, laŭ *W. de Fonvielle*: *Les Drame de la Science*. Fermo *Hachette* kaj *Kie*, 1886.

(2) Franca politika deputitaro, kiu regis Francujon de la 21 Sept. 1792 ĝis la 26 Okt. 1795. Ĝi proklamis la Respublikon, kaj mortkondamnis Ludovikon XVI^{an}.

Siaflanke, *Delambre*, anstataŭ konstati, laŭ la opinio de sia kolego, ke sufiĉe estos kontroli la mezurojn de 1740, tuj ekdividis, ke ne tiel facila estas la tasko. Dum kvindekdu jaroj, la sociala vivo estis tute aliformiginta la landon. Nenia el la altaĵoj, kiujn oni estis iam uzinta, povis utili; sekve novajn oni devis serĉi. En *Montlhéry*, la Societo popola (klubo) malhelpis liajn prilaborojn, kaj bruligis la verkaĵojn konstruitajn de l' astronomiisto kiel celotajn. Aliloke, por plialtigi kamenton, ne naskante suspektojn, la laboristo ruze pretekstis, ke la fajrujo postulas plibonigon de l' aerfluo. Aliloke ankaŭ, oni devis neniigi la rakontojn semitajn de la malamikoj al la nova Ordo, pri la partigo de la bienoj; laŭ l' opinio de la kamparanoj, la ellaboraĵoj de l' astronomiisto estis la unua akto de l' estonta senbienigo. En alia urbeto, necese estas ruzi kaj labori kaŝe, se oni ne volas komprometi la gastaman familion, ĉe kiu oni loĝas, tial ke suspektindaj estas ĝiaj aristokratemaj sentoj. Tie ĉi sonorilejo difektita tuj elfalas; tie, preĝejan turon oni devas rapide uzi, ĉar ĝi estas tuj disjetota, tial ke en la krizo politika enmiksiĝas religia persekutado.

La triangula celo elfarota inter *Joncquièrre* kaj *Montmartre* (Parizo) okazas la 10^{an} de Aŭgusto, tio estas en la tago fama pro la popola okupo de *Tuileries* (reĝa domo) kaj la efektiva falo de la reĝeco; nur per nekalkuleblaj klopodoj, kaj prokraste, la helpanta astronomiisto ekbruligas la signalojn interkonsentitajn. En *Epinay*, *Delambre* mem estas arestata; vane li montras la oficialan leteron, kiu lin rajtigas, neniu lin kredas; kaj tuj kiam la urbestro estas konvinkita, nur per aresto ŝajnigita tiu ĉi sukcesas eltiri la scienculon el la amaso ekscitita.

Oni facile imagas, kiom da tempo malŝpariĝas en diversaj klopodoj kaj malhelpoj en tiuj jaroj 1792 kaj 1793.

Eĉ pli peniga estas la sekvanta jaro. En ĝi oni vidas la jenan nekredblaĵon! la plej eminentaj anoj de la komisiitaro de Metro, nome *Borda*, *Lavoisier*, *Laplace*, *Coulomb*, *Brisson* kaj *Delambre* estas eksigataj kaj anstataŭataj per malkleruloj, kiuj eĉ unu vorton ne scias pri trigonometrio. Feliĉe la naŭa tago de *Thermidor* (27^a de Julio 1794), deĵetante Robespierre'on, savas la Metron, same kiel ĝi savas *Konvencio'n* (kunveno de 1792 ĝis 1795) kaj Francujon; same kiel Revolucio mem, la reformo metra estus haltigita, se bravuloj ne estus riskintaj la kapon, por fini la regadon de Eŝafodo, kaj kuraĝintaj rigardi vizagen Teruron same kiel Nep-tuno la ondojn kolerantajn.

Méchain, siaflanke, renkontis malsimilajn barojn. La unuaj malfacilaĵoj okazis sur la limo Hispana-Franca. Estante sur la franca teritorio, la senditoj de Hispana regno, kun kiuj li devis kunparoli, ŝajnis esti agentoj komisiitaj por prepari okupadon; male, transirinte Pireneojn, la Hispanoj ne sukcesis pruvi al siaj samlandanoj, ke *Méchain* ne estas Jakobeno (1) maskita, kiu alportas kun siaj lornoj la malamom al la reĝoj, la pastroj kaj la aristokratato.

Feliĉe la konsilantaro de Reĝo de Hispanujo, tiam militanta kontraŭ Francujo, ne enigis inter la

malamikaĵojn la pacan verkon komencitan dum la paca tempo. Malgraŭ tio *Méchain* daŭris esti suspekta al la militaj estroj de Hispanujo, kaj spione observata.

Same kiel *Delambre* en la ĉirkaŭaĵo de Parizo, la helpanto de *Méchain* ankaŭ estas arestata de la volontuloj respublikaj de l' Sudo, kies imago ekscitiĝis.

Alia malhelpo: vizitante akvomotoron en fabriko *Barcelon'a*, *Méchain* falinte rompas al si tri ripojn kaj unu ŝlosiloston; li sekve estas devigata ripozi dum longaj semajnoj. Tuj restarigite, li sciigas, ke li estas gardota, kvazaŭ malliberulo ĝis la fino de l' milito. La sciigo de tiu bedaŭrinda malhelpo alvenis Parizon samtempe kiam Marat rifuzigis al *Delambre* pasporton, kiun li postulis de Komunumo. (2)

Ambaŭ registaroj ŝajnis interkonsenti por mal-ebligi la finiĝon de l' grava scienca laboro, kiujn ili tiel fervore antaŭ kelkaj jaroj kune estis komencintaj.

Fine, por la kronado de l' afero, la mono rezervita de *Méchain* estas leĝe ekkaptata ĉe la bankiero, kvazaŭ propraĵo de fremda regno militanta kontraŭ Lia reĝa Moŝto Katolika, kaj po malgrande, po sumoj je 500 frankoj, la admirinda edzino de *Méchain* estas devigata tiri de l' registaro la monan helpon sufiĉan, por eviti la morton per malsato al si kaj sia edzo.

Kiam la komisiitaro de Metro estis reorganizita post la naŭa de *Thermidor*, la laborojn oni daŭrigis, sed okazis novaj malfacilaĵoj, ĉu pro malkonfido ĉiam vekigema, ĉu pro preĝeĵaj turoj difektitaj dum la politika ventego, kiujn oni devis anstataŭi per verkaĵoj tre kostaj, supozite ke ili estis konsentitaj, ĉu pro malestimo al la asignatoj (monpapero).

En Pireneoj, alia situacio: postenoj malfacile alireblaj, longaj haltadoj nokte, inter la ventegoj kaj fulmotondroj, sen ia rifuĝejo krom tendo, sen ia kuŝejo krom pajlaĵo. Eĉ la elementoj ŝajne konspiras kontraŭ l'entrepreno, kaj kiam unu posteno estas videbla, alia kaŝiĝas en la nebulo.

Kiom admirinda estas la energio de tiaj scienculoj, dum tiu senĉesa batalado kontraŭ la materio, kun kiu konspiras la furiozeco de la partioj, kaj la malklereco de l'amasoj, kiuj estas nekapablaj kompreni siajn verajn utilojn, aŭ distingi siajn sincerajn amikojn.

Ni atingas la tempon Direktorian(3). Ĉu vera dramo ne enhavas komikajn okazaĵojn? Ĉar *Delambre* intencas uzi signalon tre videblan, li pripensas tegi per blanka tolo la ĉarpentaĵojn de sonorilejo en Arverna vilaĝo; oni imagas, ke li elmontras la standardon monarĥan; kaj por sia trankvileco li decidas, pentri per blua kaj ruĝa koloro la flankajn partojn, poste postuli de l' registaro dokumenton, laŭ kiu la astronomiistoj estos permesataj uzi la blankan koloron, kvankam ĝi memorigas la malnovan standardon, tial ke de pli malproksime ĝi estas videbla!!

Daŭrigota.

ERNEST BACQUET.


(1) Ano de la fama samnoma klubo en Parizo, direktata tiam de la plej antaŭemaj deputitoj. Ĝi estis la ĉefa instigejo de la tumultoj kaj krimoj, kiuj malnobligis la regecon de la Konvencio.

(2) Registaro pariza revolucia, kiu instigis la teruron kaj la perforton kiel regilojn.

(3) Plenuma potencularo, kiu sekvis la Konvencion, kaj devis regi la Ŝtaton kune kun la konsilantaro de la Kvin-Centoj kaj lia de la Malnovuloj.



TRA LA MODO



Plu ne montru la malgajan mienon, kiun vi vidigis, ĉarmaj samideaninoj, kiam la antaŭan monaton rapide trarigardante la karan amikon, kiu nin interligas — mi nomis nian belan Tra la Mondo'n — intencante legi senatende la Modan Kronikon, vi ne vidis la deziratan nomon Roksono. (Pro kompto, ne ekpensis: Dezirata!!! Vere, ŝi tute ne dubas pri io, nia trompofida kronikistino». Tio min vundus ĉe la koro; lasu al mi la dolĉan iluzion, ke miaj modaj sciigoj multe vin interesas). Do, ekĝoju, ĝoju, ĝojegu, Roksono ne estas mortinta, kvankam ŝi estas malsana, kaj por esti agrabla al vi, en sia lito verkas la Virinan paĝon.

Kion vi opinias, legantinoj miaj, pri la nunsezona Modo? Neeviteble, ke ĝi neniam estis tiel multe eklektika. Ĉion ĝi permesas ja: la stilon de ĉiuj jarcentoj kaj de la plej diversaj landoj; sed, nekontraŭdireble, la greka stilo — kiom belvida! — plene regas.

Al ĝi ni ŝuldas la drapiritan jupontunikon (1), kiu naturekve naskis la peplon (2) tre diversforman. Jen mallonga antaŭe kaj malantaŭe, ĝi formas unu pinton ĉiuflanke; jen formanta arkon antaŭe, ĝi malantaŭe sekvas la trenajon; jen ĝi estas fendita ĉe la koksoj, jen ĝi estas fendita meze kaj drapirita ĉe la kokso. Nova modelo havas peplon malkovrantan nur unu kokson; la jupo estas el la punto aŭ el nesimila kaj nesamkolora teksaĵo.

La greka stilo igis modegaj la altelegantajn skarpojn el fleksebla silko aŭ Hina krepo aŭ ĉe el silktrikotajoj borderitajn per franĝoj ĉirkaŭantaj la koksojn, kaj kiuj, metite sur longajn jupojn kun trenajoj kaj sen subjupoj, falas antaŭe, flanke aŭ malantaŭe. Ĉiam multe ŝatataj tiuj jupoj kreitaj de l' famega Paquin, kiuj ekstreme muldas la koksojn kaj falas vertikale similgante nin al grekaj diinoj. Ni benu Paquin'on, kiu naskis jupon havantan ne-takseblan oportunaĵon, ĉar ĝi necesigas tre longan korseton, kiu estas la deziritaĵo de la Fakultato: kunte nante la ventron, ĝi ludas rolon de higiena zonumo lasanta plenan liberecon al la stomako kaj faciliganta la funkciojn de l'organismo.

Ĉe la « Vernissage » triumfis la silkaj frakoj helkoloraj ornamitaj per nigraj brodaĵoj aŭ galonoj, kies vidigo estis rave bela sur roboj-princinoj el nigra fenicia silko. Tiuj frakoj, tranĉitaj laŭ oblikva linio, agrafumigis rando ĉe rando, apenaŭ kovras la koksojn, kaj iras ĝis la malsupro de la malantaŭaĵo de l'jupo; ili kompletigas ankaŭ robon el malpeza drapo.

Ĉarma novaĵo estas la skarpo kun kolumo samkolora, samkolora kiel la robo sed ne samteksaĵa. Ekzemple, kostumo el *tussor* (3) Hindeblua, kies malsupro de l' jupo estas borderita per drapo samkolora, havas skarpon el Hindeblua tulo faldita, kun kolumo-maristo el samkolora drapo. Kelkaj el tiuj skarpoj estas ornamitaj per beletaj tintiloj.

La manikoj de kelkaj korsajaĵoj estas duone kaj tri kvarono longaj, sed tiuj de la plej novaj modeloj estas longaj kaj mallargaj, kaj finiĝas per puntaj falbaloj falantaj sur la manon. Belŝajnaj, certe, sed ne agrablaj dum la varma sezono; tial, tiuj longaj manikoj estas ofte el travideblaj ŝtofoj: tulo, muslino, punto, kaj la supra parto estas kovrita per mallonga maniketo havanta epoletan formon.

La roboj, laŭ la modoj Ludoviko XV^a kaj Ludoviko XVI^a, tre

modaj por la vespero, estas ornamitaj per punktoj eburkoloraj kaj similas malnovan pastelon.

Por la ceremoniaj tualetoj la punktoj el Chantilly reakiris la sukceson de l' pasinta tempo.

Citindaj la jakoj neĝustalfaritaj laŭ la stilo 1830 kaj ankaŭ la jakoj Fragonard, al kiuj oni konservis la simplan kaj naivan ĉarmon de l' pentristo, al kiu ni ŝuldas ilin.

Oni vidas ankaŭ kelkajn militajn jaketojn tute ĝustalfaritajn kun tre mallargaj manikoj, mallongaj baskoj, borderitaj per galono: la hungaraj kaj la rusaj estas la plej ŝatataj.

Kelkaj jakoj estas senigitaj je manikoj: la manikloko plilongigita ĝin anstataŭas.

Nia modelo — princino-tuniko — havas korsajon kovritan per ŝtofo formanta kolumon ornamitan per verda tafto. Jupo — el kvar partoj — kaj korsajo fermigas malantaŭe.

ROKSONO.

H. M. de E. Vagabonda Klubo.

Mallonga korespondado.

S^{mo} Cecily R. en Bedford. — Lavado matene kaj vespere per varmeta sala akvo, al kiu oni aldonas iom da borika acido, ĉesigas la lacecon de la okuloj. La akvo el ĉejano estas ankaŭ multe efika kontraŭ la inflamo de l' okuloj, kiujn ĝi igas tre brilaj.

Juna patrino. — Jes, tre facile vi povas mem purigi la blankajn feltojn. Metu ilin en sakon aŭ en kapkusenon enhavantan 500 gramojn da faruno el la grio kaj saman kvanton da ordinara faruno. Frotu, prenu, turnu viajn felojn dum ĉirkaŭ duono da horo, kvazaŭ vi lavus ilin. Poste, rigardu ĉu ili estas puraj; se ili ne estas absolute tiaj, rekomencu tiun faron, kiu devas sukcesi plene.

R.

Al la Sinjorinoj.

Okazos dum Novembro en la urbo Nagpur (Centraj Provincoj de Hindujo) granda ekspozicio kun virina sekcio. Per Esperanta cirkulero, nia samideano R. Fanshawe (Raipur, Central Provinces, Hindujo) sciigas, ke la organizantoj dezirus multajn specimenojn de la pupoj nacie vestitaj. Estos tri konkursoj: 1^a, por kolekto aŭ grupo da pupoj (premioj: 50 kaj 34 sm.); 2^a, por pupoj solaj (premioj: 20,4 — 17 — 12,2 kaj 10,2 sm.); kaj 3^a, por pupoj en edziĝaj vestoj (premioj: 17 — 12,2 kaj 10,2 sm.).

Oni akceptos ankaŭ specimenojn de punktoj, brodaĵoj sur muslino, reto, tuko, silko, atlaso...

Oni donacos 1 oran, 2 arĝentajn, 1 bronзан medalon, kaj 4 premiojn je 3,4 sm.) por tiu sekcio.

La montrontinoj sendu la objektojn al S^{mo} Fanshawe antaŭ la 30^a de Septembro, kun nomo, adreso, kaj prezo por la sendaĵoj vendeblaj, tre legeble skribitaj.



(1) Ang.: *tunic*; — lat., hisp., it.: *tunica*; — fr.: *tunique*.

(2) It.: *peplo*; — lat. kaj fr.: *peplum*.

(3) Kruda diksilka ŝtofo.

Roksono, 2, rue Abélard, Béziers, France, respondas private la leterojn enhavantajn 50 centimojn, kaj per la revuo tiujn enhavantajn 25 centimojn.

BIBLIOGRAFIO.

Malnovaj paĝoj el Lingvo Internacia, 1,25 fr. ĉe P. E. S. — Grand dictionnaire français-Esperanto, oka kajero, de bas ĝis *bibliographique*, sama eldono. — *La vangrapo*, sprita unuakta komedio de la tre konata franca literaturisto Abraham Dreyfus, bona tr. de S. Sar, 75 c., ĉe la Librejo de l' Esperanto.

Esperanto praktika. — Otto Umfrid: *Formulo pri mal-armo*, el germana lingvo tr. de P. Christaller, 25 c. ĉe Espero Pacifista. — *Nova terapio de diabeto*, de Ludwig Bäuer. Sen prezo. Ĉe « Germana Esperantisto ».

Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj, broŝuro eldonita de « Esperanto » kun informoj pri la kreo kaj elekto de la konsuloj, organizo kaj servoj de la konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj, laŭ la decidoj de la kunvenoj de la konsuloj kaj delegitoj de la Esperanto-Oficejoj dum la III^a Universala kongreso de Esperanto, 50 c. (20 sd.) ĉe « Esperanto » 8, rue Bovy-Lysberg, Genève. Estas dezirinde, ke tiu libro instingu kreon de multaj novaj konsulejoj kaj Oficejoj.

Provo de marista terminaro, verkita de kelkaj kompetentuloj sub la direkto de M. Rollet de l' Isle, hidrografiista ĉef-inĝeniero de la franca maristaro, bone konata de niaj legantoj. Tiu provo estos necese ga por ĉiuj, kiuj deziros verki ion pri maraĵoj. La volumo konsistas el multaj bildaroj montrantaj la ĉefajn teknikajn vortojn, kaj el interesa kaj instrua teksto, en kiu oni retrovas tiujn vortojn kaj aliajn, kies signifon montras la kunteksto. Por faciligi la uzon de la volumo, la novaj vortoj estas kolektitaj, fine, en seslingva vortaro; kaj la novaj vortoj sin trovas en alfabeto vortaro kun ciferoj resendantaj al la klariga teksto. Tiu volumo estas bona akiro por la « Teknika kolekto », en kiu ni jam konas anatomian vortaron, 3 komercajn verkojn monadologion, Vocabulaire technique et technologique, 1,50 fr. ĉe Hachette kaj K^o.

« Internacia Scienca Revuo » sciigas, ke ĝi « klasizos sur apartaj slipoj (kartetoj) ĉiujn teknikajn vortojn aŭ esprimojn proponitajn en tiu ĉi grava verko » por komparo kun aliaj pri similaj temoj.

Nia kunfrato konigas unuan liston (nomaron) el tre kleraj kunlaborantoj, kun iliaj adresoj kaj specialecoj, por faciligi la interrilatojn inter ili.

Ni legis ankaŭ en « I. S. R. » diskonigindan informon, laŭ kiu kolonelo Arturo de Campos Borges donis la nomon *Esperanto* al rivero, kiun li eltrovis en la kaŭĉuka regiono de Brazilujo. Al internacia scienca Asocio Esperantista aliĝis la *Franca Societo Astronomia* per sia prezidanto H. Deslandres; la fama psikologo amerikana William James, el Harvarda Universitato; kaj Prof. W. Köppen el Hamburga marobservejo. Jen 3 gravaj aliĝoj inter multaj aliaj konsiderindaj.

« Voĉo de Kuracistoj », 3^a N^o (Majo) konigas sian programon: kutimigi la diverslandajn kuracistojn uzadi Esperanton en kunfrata interŝanĝo de ideoj, diskutado pri profesiaj aferoj; konigi la esperantistan movadon inter kuracistoj... Tiuj preparoj estas prave ĵugitaj necesaj de nia kunfrato, antaŭ ol serioze pensi pri enkonduko de Esperanto en medicinajn kongresojn. Leginda ankaŭ la programo proponata por la kuracistaj kunsidoj en Dresdeno. Interesaj respondoj por la internacia enketo pri sekreto profesia; inter ili mi citos gravan respondon de la « Societo de medicinista legoscienco en Rouen, Francujo », verkitan speciale por « Voĉo de Kuracistoj » al kiu ĝin interesis Dr^o Panel el Rouen, altirante la atenton de gravaj juristoj kaj kuracistoj al Esperanto. Jen jam bona rezultato ŝuldata al nia juna kunfrato. Ĝi ankaŭ longe raportas pri la premio gajnita de Sr^o Bregon en Barcelono (100 fr., 40 sm.), dank' al la internacia enketo de « Tra la Mondo » pri edukado. Sinceran dankon.

Longe raportis ankaŭ pri tiu fakto nia bonega kunfrato « Tutmonda Espero ».

« Bankverein Suisse » kaj banko Pictet en Genevo eldonis internaciajn ĉekojn, kies valoro estas montrebla per spemililoj. « Internacia Scienca Oficejo » eldonis similajn ĉekojn sen nomo de banko, do utiligeblaj de ĉiuj post aldono, mane, de l' bankier-nomo. Tio estos bonega propagando en la financaj randoj. 1 kajero da 50 sennomaj ĉekoj kostas 50 sd. kaj estas havebla de I. S. O. 8 rue Bovy-Lysberg, Genevo.

Manila, the pearl of the orient, bela volumo kun interesaj kaj multaj ilustraĵoj pri Manila. Ĝi estis senpaga aldono al la februara n^o de « Filipina Esperantisto ». La marta n^o de tiu ĉiam interesa kaj tre regula monataĵo enhavas artikolon pri *Avertilo por la Sprung-Fuess Barografo*, speciale verkita por « F. E. » de distinginda sciencisto Rev. Pastro George M. Zwack, S. J., Sekretario de l' Meteorologia Observatorio ĉe Manila. Tia kunlaborado estas tute honoriga por nia bonega kunfrato.

« *British Esperanto Asocio* » kaj nia interesa kaj akurata kunfrato « The British Esperantist », estis devigataj ŝanĝi sian loĝejon, pro necese ga pligrandiĝo de sidejo. Ni tre ĝojas pro tiu prospera situacio de societo kaj gazeto, kiuj tiel utilis al Esperanto de sia fondiĝo.

Mi tre dankas « Belga Sonorilo », kiu, kvankam ni ne samopinias pri la reformaj aferoj, daŭras esprimi nian enhavon.

Estas vere, kaj juste diri, ke nia malnova kunfrato daŭrigas en tre bona Esperanto sian viglan porreforman agadon.

STELETO.

La 1^a k. 2^a N^o de « *Progreso* », la anoncita revuo, reformema, aperis.

Pro manko de spaco ni nur rimarkigos al Sr^{oj} Leau kaj Couturat, ke ilia « Programo », prezentita sub formo de alvoko « al ĉiuj amikoj de la *Lingvo internacia* » estas redaktita en *Esperanto*. Do ili mem konfesas, ke la ideo de *Lingvo internacia* kaj *Esperanto* estas sama afero; ke, por esti komprenata de la amikoj de *Lingvo internacia*, oni devas skribi kaj paroli en *Esperanto*.

Lingvo, kies kontraŭuloj tiel konstatas la potencon, la ta ŝegecon, ne havas ion por timi. Ni do flanklasu la komplik-aĵojn, la necertajn plibonigaĵojn, kiujn oni volus enkonduki en nian simplan kaj flekseblan lingvon; ni sekvu nian vojon.

« Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita.

Ĝi estas, la voĉ' elektita ».

A. MONTROSIER.

Internacia Asocio de Instruistoj. Franca Sekcio.

Ni jam parolis pri la iniciato de la Instrua sekcio de l' komitato de « British Esperanto Asocio », por kunveni en Dresden' on grandan anaron da esperantistaj edukistoj. Ni ankaŭ konigis, ke la instrua grupo en Dresden' o, aranĝas la aferon. En Francujo Sr^o Durieux, pri kies rimarkindan agadon ni parolis, sin okupas kun Rektoro Boirac pri la starigo de Societo de francaj geedukistaroj, estonta sekcio de la Internacia Asocio de Instruistoj fondita en Cambridge.

Ni esperas, ke la francaj profesoroj kaj instruistoj deziros alveni en Dresden' on kun sufiĉe organizita Societo, kaj ni tre instigas ilin, ke ili sin turnu al Sr^o Durieux (Directeur de l' Ecole Montesquieu, Lille) por proponi al li sian aliĝon, kaj helpon por regiona agado.

Historio sen paroloj. (Sed tamen kun versoj!) — 3^a Premio.

I.	II.	III.
Oftege dikulo, vi scias sendube, Tre estas kapabla por naĝo : Banejon jen vidu sur bildo malsube, Pentrita sur tiu ĉi paĝo ! (1)	Vidante starantan sur trabo elasta Bonege vestitan bel' — dandon, Pri sia forgesis li korpo balasta, De l' trabo ekkaptis finrandon.	La trabo resaltis — la dand' en aero Jam devas elerni flugarton! Treega lin kaptas ferur' — malespero; Imagu al vi lian farton!
Ho! Nia dikulo ja estas tre lerta: En akvo li provas eĉ fumi; Sed tamen li estas ankoraŭ nesperta Por tiun lertajan plenumi.	La dando sin klinis servema kun mano, Cigaro ektuŝis cigaron; Bangasto senvesta kun sia infano Atente rigardas la paron.	La akvonaĝanto en ondoj luligas — Ĉielen buligas la fumo; L'Aerofluganto jam teren faligas (2), — Ankoraŭ nur flirtas nazumo.
Cigaron estingas de l'akvo ŝprucero — Kaj vane ĝin suĉas dikulo. Subite li aŭdas: » Ne grava — l' afero: Ricevu jen fajron, bonulo! »	La trabo fleksiĝis.... Dikulo kontenta En akvon sin jetas trankvile — Apenaŭ forpasis tempero momenta, (Vi, certe, divenas facile!)	La patro ridegas senkore, kun miro L'infano etendas la manon — Kaj dando mizera, kun ĝemo-sopiro, Ve! devas ricevi tuj banon!

R. FRENKEL (Siberujo).

(1) Vidu la paĝon 59^{an}. — (2) Poezia cedajo.

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.



FLOR'ESPERANTA

LIKVORO DE L'INTERLIGO
(FORTIGA KAJ DIGESTIGA)

La analizo pravas la bonajn kvalitojn de tiu-ĉi higiena likvoro
Ĝi meritas de la konfido kaj la preferon de la Popoloj

TROYES-FRANCE L. GUYOU & J. FÈVRE



MARKO LIVERITA

CHABLIS QUINA

EL MALNOVA ENLANDA VINO.

Kiel ĉiuj preparajoj kun kinkono, la CHABLIS QUINA, deponas maljunigante,
sed tamen ĝi konservas tute siajn eminentajn higienajn proprecojn

LIVERITA LAŬ LA LEGO. **L. GUYOU & J. FÈVRE**
TIU VINO NE ESTAS MEDIKAMENTO. TROYES

ESPERANTINE

Digestiga likvoro

Alprenita je la Esperantista
Kongreso. Genève 1906

Prezo: FRANCUJE. —
11 f50 la kesto da 2 boteloj
Sen kosto pri transporto kaj
impostoj.

ALLIANDE. — 4 f ĉiu botelo
prenita en St Etienne,
impostoj kaj transporto pluaj.

Generala Tenejo por
Francujo kaj Fremduloj:

J. B. Brunon-Chauvet
St Etienne (France).

Legu DUONSURDA kaj
UNUA ĈAPITRO.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Administracio kaj Redakcio:

SCIENCA OFICEJO, 8, RUE BOVY-LYSBERG,
Genevo-Svislando.

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesimiloj 75 spesdekoj).

Unu numero: 25 spesdekoj

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Genevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warnier & Cie* Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Gusti*, Livorno (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Polujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Höst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).



PROPAGANDO. — Ĉe « Esperantista Centra Oficejo », 51, rue de Clichy, Paris. *L'Esperanto et les Institutions publiques*. Ĝi estas komenco de tre grava porpropaganda dokumentaro, enhavanta en franca lingvo aŭtentikajn dokumentojn kolektitajn en Francujo: Esperanto ĉe la Deputita Ĉambro; Pariza Urba Konsilantaro, diversaj ministroj, Franca Instituto... Ĝi estos sekvata de aliaj por aliaj landoj. 1 fr. 25.

Esperantista Societaro, 1 fr. 50, 4^a eldono korektita ĝis la 31^a de dec. 1907, kiu donas vere ĝojigajn sciigojn pri niaj progresoj. La nombro de la diversspecaj societoj kreskis de 639 ĝis 865; tiu de la konsulejoj, oficejoj, de 170 ĝis 232, k. c. Tiaj sciigoj donas plenan esperon en la estonteco. Tial ni varme konsilas al la grupoj, ke ili havigu ilin. Jam multe da ili havas kalkulon ĉe « E. C. O. » kaj ricevas tuj la diversajn eldonaĵojn de la oficejo. Tiu procedo estas tre rekomendinda.

Oni menu la folion-katalogon.

Manuel du repertoire bibliographique universel: eltiraĵoj pri la partoj speciale aplikablaj al la bibliografio de Esperanto. Tiu volumo kompletigas la 2 interesajn artikolojn de S^{ro} G. Chavet presitajn en « Tra la Mondo » (1^a J. Noj 9^a kaj 10^a). Estas tre grave por nia afero, ke tiu *Manuel* estas eldonita kun la apogo de la *Internacia Instituto de Bibliografio*, rezultato ŝuldata al nia eminenta samideano Generalo Sébert. Ĝi estas ankaŭ, pro tio, bonega propagandilo.

« E. C. O. » sciigas, ke de la estonta monato Junio ĝi eldonos oficialan gazeton esperantistan, kiu publikigos la aktojn de la oficialaj institucioj de Esperanto, aldonante ĉiujn eblajn sciigojn por la propagando: *Oficiala parto* — komunikoj de D^{no} Zamenhof. Lingva Komitato. Konstanta Komitato de la kongresoj. — *Neoficiala parto* — Centra Oficejo. Societoj kaj Grupoj. Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj. Registaroj kaj publika institucioj. Diversaj sciigoj. Gazetoj kaj bibliografio.

Pri ĉiuj tiuj temoj oni publikigos sciigojn kiel eble plej ĝustajn, simplajn faktojn sen komentarioj aŭ diskutoj, 5 fr. jare. Redakto kaj administro, 51 rue de Clichy, Paris, ĉe kiu oni estas petata sin turni por abonon kaj enpresotaj sciigoj.

Grava alvoko. — La personoj kiuj havas proponojn por fari, rilate al la temoj studotaj de la kvara kongreso bonvolu tuj sendi ilin al la Prezidanto de la konstanta komitato, 51 Rue de Clichy, Paris, eĉ se ili jam publikigis siajn proponojn en ĵurnaloj, kie eble ili ne estis rimarkataj de la komitatanoj.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No afrankita (f. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l' Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al Sro Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K^o, 79 Boulevard St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Socia internacia Revuo. — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

La Verda Standardo. — Sciencia kaj literatura. Monate 12 paĝoj. 4 fr. (1,60 Sm.) ĉe S^{ro} Mariĉ Agoston, Budapeŝt IX, Ŭllői-ut 59. IV, 8.

Voĉo de kuracistoj. — Monata organo por internacia korespondado de kuracistoj en aferoj profesiaj, etikaj kaj social-medicinaj. Jare 2 fr. 50 (1 Sm.) ĉe D^{ro} Stefan Mikolajski, Lwów, strato Sniadeckich 6, Aŭstrio-Galicio.

Germana Esperantisto

Oficiala organo de la Germana Esperantista Societo

kun literatura aldono.

« LIBERAJ HOROJ »

aperas ĉiumonate en lingvoj Esperanta kaj Germana kaj celas disvastigi la Esperantan movadon en ĉiuj germanlingvaj landoj.

Jara abonprezo Mk. 3,00 (1,50 Sm.)

Redakcio kaj administracio:

ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL,

Berlin, S. Prinzenstr. 95.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo; 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belgia Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo, nun reformema: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco. Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe British Esperanto Asocio, Museum Buildings, High Holborn, W.C. London.

Brazia Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro.

Ĉasopis Českých Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.) 3 k. por Aŭstrio. Adm. kaj Red.: Praha, Bohemujo.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta No: 35 cent. (14 Sd.)

Filipina Esperantisto. — Organo de Filipina Esperanto Asocio. Jare 5 fr. (2 Sm.) P. O. Box 326, Manila.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 4 fr. (1,60 Sm.). — No 1^a, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

La Lumo. — 5 fr. (2 Sm.) Ĉe Ivan Nenkov, strato sv. gorska, no 2299 V. Tirnovo, Bulgarujo.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 5 fr. (2 Sm.) Warszawa, Hoza, No 40, m. 8.

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

De Lusthof. — Ĉiumonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj ĵurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.). Sin turni al la presisto de *Tra la Mondo*, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribaĵojn; ĉiusistema stenografio, literaturo kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

UNUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Kompletaj kolektoj. 6,40 Sm.

Restas ankoraŭ tre malmulte da ili akireblaj nur senpere. Kolektoj nekompletaj:

1^e mankas la Aprila No. 3,20 Sm.

Restas ankoraŭ 2, akireblaj nur senpere.

2^e mankas la Aprila kaj Maja Noj. 2,40 Sm.

DUA JARO DE « TRA LA MONDO »

Sen specialaj kondiĉoj. 3,20 Sm.

UNUA ĈAPITRO DE MIAJ MEMORSKRIBOJ.

Ĉarma rakonto de
FRANÇOIS COPPÉE.

Ano de la Franca Akademio.

Tradukita en Esperanto de A. Montrosier.

75 c. — 30 Sd, ĉe « Tra la Mondo ».

DUONSURDA.

Originala duakta komedio de

JOHANINO FLOURENS,

30 c. — 12 Sd, ĉe « Tra la Mondo ».

Rekomendataj firmoj.

ESPERANTA RESTORACIO ANONCAGENTO. 80, Rue Mazarine, PARIS 6^e. Bona familia kuirajo je moderaj prezoj. La mastro parolas kaj instruas Esperanton.
C. A. G. BROWNE, 53 kaj 54, Wych Street, Strand, W. C. London, Anglujo, deziras korespondi pri anoncoj kaj reklamoj. Varbas anoncojn por « Tra la Mondo ».



Kunlaborado.

S^{ro} L. de Guesnet, nia sporta kunlaboranto, sciigis nin la 30^{an} de Aprilo, ke li forlasas Esperanton kaj, sekve, ne plu povas kunlabori en « Tra la Mondo ». Ni bedaŭras la decidon de nia ĝis nun sindona helpanto, de kiu ni konservis ĉiam la plej bonan memoron. Ĉar lia decido havas precipe eksterlingvajn motivojn, ni esperas, ke iam li revenos al Esperanto, por kiu li trovos vere utilan uzon de sia bela junula fervoro. « T. I. M. »

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato

48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto.

LITERATURA ALDONO: 16 paĝoj.

JARA ABONO: 7 fr. 50 (3 sm.)

ADMINISTRACIO:

Preso Esperantista Societo,

33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Preso Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Fandejo por presiloj DEBERNY kaj K^o

58, Rue d'Hauteville — PARIS

Kompleta instalo de presejoj. Granda elekto pri skriblitoj, tekstoj kaj ĉiuspecaj fantaziaĵoj. Preslitoj kun supersignoj specialaj por ĉiuj fremdaj lingvoj kaj ESPERANTO. La fandejo DEBERNY kaj K^o sendas, laŭ peto, presprovaĵojn el ĉiuj siaj serioj en kiuj ĝi posedas la specialajn supersignojn por ESPERANTO.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.